

PASKO

AUGUST
STRINDBERG

167

N.E.K.

821.113.6-2



PERSONOJ.

Sinjinorino Heyst.
 Elis, ŝia filo, fil. kandidato, instruisto.
 Eleonora, ŝia filino.
 Kristina, la fianĉino de Elis.
 Benjamin, gimnaziano.
 Lindkvist.

82-2

SCENAJO

por ĉiuj aktoj.

La tuta antaŭaĵo konsistas el vitroverando en la malsupra etaĝo, aranĝita kiel ĉambro. Meze granda pordo al ĝardenkvadrato kun barilo kaj barilpordo al la strato. Aliflanke de la strato, kiu same kiel la domo kuŝas sur altaĵo, oni vidas malaltan barilon de ĝardeno, kiu deklivas malsupren al la urbo. La fono prezentas la printempoverdajn arbosuprojn de tiu ĝardeno. Super ili preĝeja turo kaj monumenta domgablo.

La fenestroj de la verando, kiu okupas la tutan larĝon de la scenejo, havas kurtenojn el helflava, flordesegna kretono kaj estas ŝoveblaj. Murspegulo pendas sur fenestrostato maldekstre de la pordo, sub la spegulo estas datmontrilo.

Dekstre de la fonpordo granda skribtablo kun libroj, skribilaro kaj telefono. Maldekstre de la fonpordo manĝotablo, glimpordeta ferforno, bufedo. Dekstre en la unua plano kudrotablo kun lampo. Apud ĝi du brakseĝoj. En la plafono pendas plafonlampo.

Ekstere sur la strato gaslanterno kun Auer-flamingo.

Maldekstre en la verando estas pordo al la ĉambraro; dekstre estas pordo al la kuirejo.

Tempo: la nia.

BIBLIOTEKO

de la

NOVA ESPERANTO KLUBO

St. Gallen,



702276

UNUA AKTO.

Sankta Ĵaŭdo.

Muziko antaŭ tiu akto:

HAYDN:

Sieben Worte des Erlösers.

Introduction: *Maestoso Adagio.*

(Sunradio falas oblikve en la ĉambron kaj tuŝas unu el la seĝoj ĉe la kudrotablo. Sur la alia ne prilumita seĝo sidas KRISTINA kaj enmetas rubandon en paron da blankaj novgladitaj ĵaluzioj.)

ELIS

(envenas en malbutonita vintra surtuto, portante pakon da aktoj, kiun li metas sur la skribtablon. Poste li deprenas la surtuton kaj pendigas ĝin maldekstre).

Bonan tagon, mia amiko!

KRISTINA.

Bonan tagon, Elis!

ELIS (ĉirkaŭrigardas).

La internaj fenestroj elprenitaj; la planko lavita, puraj kurtenoj . . . jes, estas ree printempo! Oni forhakis la stratglacion, kaj malsupre ĉe la rivero floras la salikoj . . . jes, estas printempo . . . Kaj mi povas formeti la vintran surtuton . . . jen, ĝi estas tiel peza (pesas la surtuton per la mano) kvazaŭ ĝi estus ensorbinta ĉiujn penojn de la vintro, la ŝviton de l' angoro kaj la polvon de la lernejo . . . Ho!

KRISTINA.

Kaj nun vi havas libertempon!

ELIS.

Paskan libertempon! Kvin belajn tagojn por ĝui, por spiri, por forgesi!

(Donas la manon al Kristina kaj poste sidiĝas en la brakseĝon.)

Ho vidu, la suno revenis . . . ĝi foriris en novembro, mi memoras la tagon, kiam ĝi malaperis malantaŭ la bierfarejo oblikve trans la strato . . . Ho, tiu vintro! Tiu longa vintro!

KRISTINA

(kun gesto al la kuireja pordo).

Silentu! Silentu!

ELIS.

Mi silentos, kaj mi ĝojos, ke ĝi estas trapasita . . . Ho, la bona suno . . .

(Li frotas la manojn kaj faras, kvazaŭ li duŝus sin.)

. . . mi volas bani min en sunbrilo, lavi min per lumo post tiu malhela malpuraĵo . . .

KRISTINA.

Silentu! Silentu!

ELIS.

Aŭdu, mi kredas, ke la paco revenas, kaj ke la malfeliĉoj laciĝis . . .

KRISTINA.

Kial vi kredas tion?

ELIS.

Jes, ankaŭ pro tio, ke blanka kolombo alflugis, kiam mi ĵus preteriris la katedralon; ĝi sidiĝis sur la trotuaron, kaj ĝuste antaŭ miaj piedoj ĝi faligis branĉeton, kiun ĝi portis en la beko.

KRISTINA.

Ĉu vi vidis, kiuspecan branĉeton?

ELIS.

Apenaŭ estis oliva, sed mi kredas, ke estis pacosigno, kaj ĝuste nun mi sentas sunan, ĉielfeliĉan trankvilon . . . Kie estas patrino?

KRISTINA (gesto al la kuirejo).

En la kuirejo!

ELIS (mallaŭte, fermas la okulojn).

Mi aŭdas, ke estas printempo! Mi aŭdas, ke la internaj fenestroj estas for. — Ĉu vi scias, kiel mi aŭdas tion? — Plej pro la aksingoj de la veturiloj . . . sed kio estas? La fringoj kantas! Kaj oni martelas en la ŝipkonstruejo, kaj odoras oleofarbo de la vaporŝipoj, de la ruĝa minio.

KRISTINA.

Ĉu tion vi sentas eĉ tie ĉi?

ELIS.

Tie ĉi? Vere, ni estas tie ĉi, sed mi estis tie, tie en la nordo, kie kuŝas nia hejmo . . . Kiel ni venis al tiu ĉi terura urbo, kie ĉiuj homoj malamas unu la alian, kaj kie oni ĉiam soliĝas? Jes, estis la pano, kiu montris la vojon . . . sed apud la pano kuŝis la malfeliĉoj: la krima ago de patro kaj la malsano de mia fratineteto; — Diru, ĉu vi scias, ĉu estis permesate al patrino viziti patron en la malliberejo?

KRISTINA.

Mi kredas, ke ŝi estis tie eĉ hodiaŭ!

ELIS.

Kion ŝi diris?

KRISTINA.

Nenion; ŝi parolis pri aliaj aferoj!

ELIS.

Io tamen estas gajnita; post la verdikto venis certeco kaj aparta trankvilo, kiam silentiĝis la sciigoj de la gazetoj. Unu jaro pasis; post unu jaro li liberiĝos, kaj tiam ni povos rekomenci.

KRISTINA.

Mi admiras vian paciencon en la sufero.

ELIS.

Ne faru tion! Admiru ĉe mi nenion, ĉar mi havas nur mankojn! Nun vi scias tion! Ho! Se vi volus kredi tion!

KRISTINA.

Se vi suferus pro propraj mankoj, sed estas ja pro tiuj de aliaj!

ELIS.

Kion vi kudras?

KRISTINA.

Estas ja la kuirejaj ĵaluzioj, kara mia!

ELIS.

Aspektas kiel edziniĝa vualo ... Aŭtune, Kristina, vi fariĝos mia edzino, ĉu ne?

KRISTINA.

Jes, sed unue ni pensu pri la somero!

ELIS.

La somero ja! (Elpoŝigas ĉeklibron.) Vidu, la monon mi jam havas en la banko! Kiam finiĝos la lernejo, tiam ni iros norden al nia lando — al Melaren. La

dometo staras en ordo, kiel ĝi staris en nia infanaĝo, la tilioj restas, la platboato kuŝas sub la bordaj salikoj ... Ho, se estus somero, kaj mi povus bani min en la lago! Tiu malhonoro de la familio metis sin sur miajn animon kaj korpon, kaj mi sopiras al lago, en kiu mi povas lavi min.

KRISTINA.

Ĉu vi aŭdis ion de fratino Eleonora?

ELIS.

Jes, la kompatinda, ŝi estas maltrankvila kaj skribas leterojn, kiuj disŝiras min. Ŝi volas for kaj hejmen kompreneble, sed la estro de la azilo ne kuraĝas lasi ŝin, ĉar ŝi faras agojn, kiuj kondukus al malliberejo. Ofte la konscienco riproĉas min terure, ĉar mi subtenis ŝian internigon.

KRISTINA.

Kara amiko, pro ĉio vi riproĉas vin, sed en tiu okazo estis ja bonfaro, ke la kompatinda ricevis flegadon.

ELIS.

En tio vi ja pravas, kaj verdire ŝajnas al mi pli trankvile, kiel nun estas. Jes, ŝi havas tiel bone, kiel ŝi povas havi! Kaj kiam mi pripensas, kiel ŝi ĉirkaŭiris tie ĉi kaj ĵetis ombbron sur ĉiun erecon da ĝojo, kiel ŝia sorto premis nin kiel inkubo, turmentis nin ĝis malesperiĝo, tiam mi estas tiom egoista, ke mi sentas faciligon, kiu similas al ĝojo. Kaj vidi ŝin eniri tra tiuj ĉi pordoj, estus la plej granda malfeliĉo, kiun mi nun povas imagi. Tiom aĉa mi estas!

KRISTINA.

Tiom homa vi estas!

ELIS.

Kaj tamen . . . mi suferas, suferas je la penso pri ŝiaj suferoj, kaj tiuj de mia patro!

KRISTINA.

Ŝajne kelkaj naskiĝas por suferi . . .

ELIS.

Kompatinda mia, kiu eniĝis en nian familion, dekomence juĝitan . . . kaj kondamniton!

KRISTINA.

Elis! Vi ja ne scias, ĉu estas provoj aŭ punoj!

ELIS.

Kio ĝi estas por vi, tion mi ne scias, ĉar certe vi estas senŝulda, se iu!

KRISTINA.

Larmoj matene, ĝojo vespere! Elis, eble mi povos helpi vin trapasi . . .

ELIS.

Ĉu vi kredas, ke patrino havas blankan kravaton?

KRISTINA (maltrankvile).

Ĉu vi foriros?

ELIS.

Mi iros al tagmanĝo. Petro disputis hieraŭ, kiel vi scias, kaj li donos tagmanĝon hodiaŭ!

KRISTINA.

Ĉu vi volas iri al tiu festeno?

ELIS.

Vi volas diri, ke mi forestu, ĉar li montris sin kiel sufiĉe sendanka lernanto de mi.

KRISTINA.

Mi ne neas, ke lia malfidelo ekscitis min; promesinte citi vian disertacion li prirabis ĝin sen indiki la fonton.

ELIS.

Ho! Tio estas ordinara, kaj mi ĝojas en la konscio, ke »tion faris mi«.

KRISTINA.

Ĉu li vin invitis?

ELIS.

Vere, tion li ne faris! Verdire estas strange, ĉar dum pluraj jaroj li parolis pri tiu tagmanĝo, kvazaŭ mi memkompreneble partoprenu, kaj mi parolis al aliaj pri la afero. Preterlaso de invito nun estus por mi publika hontigo. Egale, ne estas la unua fojo; kaj ne la lasta!

(Paŭzo.)

KRISTINA.

Benjamin ne venas! Ĉu vi kredas, ke li sukcesas en la skriboj?

ELIS.

Tion mi certe esperas, en latino kun alta atesto!

KRISTINA.

Benjamin estas bona knabo.

ELIS.

Neordinare, sed iom cerbuma. Vi ja scias, kial li estas en nia hejmo?

KRISTINA.

Ĉu pro tio . . .

ELIS.

Pro tio . . . ke mia patro kiel kuratoro foruzis lian monon, same kiel de multaj aliaj! Vidu, Kristina, tio estas la terura, ke mi en la lernejo devas vidi tiujn prirabitajn senpatrulojn, kiuj nun suferas la humiligon esti nepagantaj lernantoj. Vi povas kompreni, per kiaj okuloj ili rigardas min. Mi devas ĉiam pensi pri ilia mizero, por povi pardoni al ili ilian kruelecon.

KRISTINA.

Mi kredas, ke via patro finfine havas pli bone ol vi!

ELIS.

Finfine!

KRISTINA.

Elis, ni devus pensi pri la somero kaj ne pri la pasinto!

ELIS.

Jes, pri la somero! — Aŭdu, lastnokte mi vekiĝis pro studenta kantado; oni kantis: »Jes, mi venos, kampoj kaj birdaroj, ilin, gaja vent', salutu vi! Al la montoj, al freŝverdaj valoj, al la lagoj resopiras mi. Kiel iam en la infanaĝo . . .» (Leviĝas ekscitita.) Ĉu mi revidos ilin, ĉu mi povos foriri de tiu ĉi terura urbo, de Ebal, la monto de malbeno, kaj revidi Garizim?

(Sidiĝas ĉe la pordo.)

KRISTINA.

Jes, jes! Estos tiel!

ELIS.

Sed ĉu vi kredas, ke mi vidos miajn betulojn kaj tiliojn, kiel mi iam vidis ilin, ĉu vi ne kredas, ke kovros ilin la sama nigra vualaĵo, kiu tie ĉi kovras la naturon kaj la vivon post tiu tago . . .

(Montras al la brakseĝo, kiu nun staras en ombro.)

Vidu, nun la suno foriris!

KRISTINA.

Revenos, kaj tiam por resti pli longe!

ELIS.

Estas vere; la tagoj longiĝas kaj la ombroj mal-longiĝas.

KRISTINA.

Ni iras al la lumo, Elis, kredu min.

ELIS.

Foje mi kredas tiel, kaj kiam mi pensas pri la pasinto kaj komparas ĝin kun la nuno, tiam mi estas feliĉa. Pasintjare, tiam vi ne sidis tie, ĉar tiam vi estis foririnta de mi, rompinte la gefianĉecon! Jen, tio estis la plej malfacila el ĉio. Mi kvazaŭ mortis, pecon post peco; sed kiam vi revenis — mi reviviĝis. Ĉu vi memoras, kial vi foriris?

KRISTINA.

Ne, tion mi ne memoras, kaj nun ŝajnas, kvazaŭ motivo ne ekzistis. Mi nur sentis instigon foriri; kaj mi foriris, kvazaŭ en dormo. Kiam mi revidis vin, mi vekiĝis kaj estis feliĉa!

ELIS.

Kaj nun ni ne disiĝos plu, ĉar se vi nun forirus, tiam mi efektive mortus! . . . Jen venas patrino! Diru nenion, indulgu ŝin en ŝia imagita mondo, kie ŝi vivas kaj kredas, ke patro estas martiro kaj ĉiuj liaj viktimoj friponoj.

S-INO HEYST

(envenas el la kuirejo, en kuireja antaŭtuko, senŝeligante pomon; parolas afable, iom naive).

Bonan tagon, infanoj! Ĉu vi volas havi la pomsupon malvarma aŭ varma?

ELIS.

Malvarma, panjo.

S-INO HEYST.

Estas bone, mia knabo, vi ĉiam scias, kion vi volas, kaj diras tion, sed tion ne povas Kristina. Kaj tion Elis lernis de sia patro; li ĉiam sciis, kion li volis kaj faris. Tion homoj ne toleras, kaj tial iris malbone por li. Sed iam venos lia tago, kaj tiam li pravos kaj la aliaj malpravos! . . . Jen, kion mi volis diri? Jes! Ĉu vi scias, ke Lindkvist transloĝiĝis al tiu ĉi urbo? Lindkvist, la plej granda el ĉiuj friponoj!

ELIS (leviĝas, ekscitita).

Ĉu li venis tien ĉi?

S-INO HEYST.

Jes, li loĝas oblikve trans la strato.

ELIS.

Do oni vidos lin preteriri ĉiujn tagojn. Ankaŭ tio!

S-INO HEYST.

Lasu min paroli kun li nur unufoje, kaj li neniam revenos, ĉar mi konas liajn malgrandajn apartaĵojn! . . . Nu, Elis, kiel sukcesis Petro?

ELIS.

Sukcesis bone!

S-INO HEYST.

Tion mi kredas. Kiam vi intencas disputi?

ELIS.

Kiam mono sufiĉos, panjo!

S-INO HEYST.

Kiam mono sufiĉos! Tio ne estas vera respondo! . . . Kaj Benjamin! Ĉu li sukcesis en la skriboj?

ELIS.

Ni ne scias ankoraŭ; sed li tuj venos!

S-INO HEYST.

Jees, Benjamin ne tute plaĉas al mi, ĉar li konduktas, kvazaŭ li havus rajtojn . . . sed tion ni forigos! Bona knabo tamen. Jes, kaj alvenis paketo al vi, Elis.

(Eliras tra la kuireja pordo kaj tuj revenas kun paketo.)

ELIS.

Kiom bone patrino konas kaj sekvas ĉion; foje mi kredas, ke ŝia naiveco estas iom ŝajnigita.

S-INO HEYST.

Jen la paketo! Lina akceptis ĝin!

ELIS.

Donaco! Mi timas donacojn, de kiam mi foje ricevis keston kun stratŝtonoj.

(Metas la paketon sur la tablon.)

S-INO HEYST.

Nun mi reiros en la kuirejon! — Ĉu ne estas tro malvarme por vi kun malfermita pordo?

ELIS.

Tute ne, panjo.

S-INO HEYST.

Elis ne devas meti sian surtuton tien . . . aspektas tiel senorde! . . . Nu, Kristina, ĉu miaj ĵaluzioj baldaŭ estos pretaj?

KRISTINA.

Post kelkaj minutoj, panjo!

S-INO HEYST.

Jes, Petron mi ŝatas; lin mi plej ŝatas . . . ĉu vi ne partoprenos la tagmanĝon, Elis?

ELIS.

Certe mi partoprenos.

S-INO HEYST.

Nu, kial vi diris, ke vi volas havi la pomsupon malvarma, se vi devos foriri. Vi ne estas tre ordema, Elis. Sed Petro estas ordema! . . . Kaj fermu la pordojn, kiam fariĝos malvarme, por ke vi ne havu nazkataron! (Eliras dekstre.)

ELIS.

La bona maljunulino . . . Kaj ĉiam Petro . . . ĉu ŝi intencas petolinciti vin per Petro?

KRISTINA.

Min?

ELIS.

Vi ja scias, ke maljunulinoj ŝatas tiajn aferojn, estas nur ŝerco kaj ŝajnigo!

KRISTINA.

Kian donacon vi ricevis?

ELIS (ŝirmalfermas la paketon.)

Fastotempa branĉeto! . . .

KRISTINA.

De kiu?

ELIS.

Anonime! . . . Nu, tio estas ja nur ŝerco, mi metos ĝin en akvon, kaj ĝi verdiĝos kiel la bastono de Aron! Betulo . . . »kiel iam en la infanaĝo« . . . Kaj Lindkvist venis tien ĉi.

KRISTINA.

Kio pri li?

ELIS.

Al li ni havas la plej grandan monŝuldon.

KRISTINA.

Vi tamen ne ŝuldas al li?

ELIS.

Jes, ni, unu por ĉiuj kaj ĉiuj por unu; la nomo de la familio estas malhonorita, kiam ŝuldo ankoraŭ ekzistas.

KRISTINA.

Prenu alian nomon!

ELIS.

Kristina!

KRISTINA.

(formetas la laboron, kiu estas preta).

Dankon, Elis! Mi volis nur provi vin!

ELIS.

Sed vi ne devas tenti min! . . . Lindkvist estas malriĉa homo kaj bezonas la sian . . . Kie pasis mia patro, estas kvazaŭ batalkampo kun mortintoj kaj vunditoj . . . kaj patrino kredas, ke li estas la viktimo! . . . Ĉu vi volas promeni?

KRISTINA.

Kaj serĉi la sunon? Volonte!

ELIS.

Ĉu vi komprenas, ke la Savanto suferis pro niaj ŝuldoj, kaj tamen ni devas daŭrigi la pagadon. Neniu pagas por mi!

KRISTINA.

Sed se iu pagus por vi, ĉu tiam vi komprenus . . .?

ELIS.

Jes, tiam mi komprenus! . . . Silentu! Benjamin venas. Ĉu vi povas vidi, ĉu li estas ĝoja?



KRISTINA

(elrigardas tra la fonpordo).

Li iras malrapide ... Kaj nun li haltas ĉe la fontano ... kaj lavas la okulojn ...

ELIS.

Ankaŭ tio!

KRISTINA.

Tamen atendu ...

ELIS.

Larmoj, larmoj!

KRISTINA.

Paciencon!

*

BENJAMIN

(eniras, afabla, estimkonduta sed ĉagrenita; li portas kelkajn librojn kaj aktujon).

ELIS.

Nu, kiel vi sukcesis en la latino?

BENJAMIN.

Iris malbone!

ELIS.

Montru vian skribaĵon! Kion vi faris?

BENJAMIN.

Mi skribis u t kun indikativo, kvankam mi sciis, ke devas esti konjunktivo.

ELIS.

Do vi estas perdita! Sed kiel vi povis?

BENJAMIN (humile).

Tion mi ne povas klarigi ... mi sciis, kiel devas esti, volis skribi la ĝustan kaj faris malĝuste!

(Sidiĝas animpremite ĉe la manĝotablo.)

ELIS

(peze sidiĝas ĉe la skribtablo kaj legas en la aktujo de Benjamin).

Jes, tie ĉi staras indikativo! Ho mia Dio!

KRISTINA (pene).

Nu, pli da feliĉo venontan fojon: La vivo estas longa — tiel terure longa!

BENJAMIN.

Jes, ĝi estas.

ELIS (malgaje sed ne amare).

Ke ĉio venas samtempe, ankaŭ! — Kaj vi estis mia plej bona lernanto, kion mi do povas atendi de la aliaj! — Mia reputacio kiel instruisto perdiĝos, mi ne ricevos lecionojn plu, kaj ... ĉio disfalos! (Al Benjamin.) Ne tiel malĝoju ... ne estas via kulpo ...

KRISTINA

• (kun ekstrema peno).

Elis! Kuraĝon, pro Dio, kuraĝon!

ELIS.

De kie mi prenu ĝin?

KRISTINA.

De tie, kie vi antaŭe ricevis ĝin!

ELIS.

Ne estas nun kiel antaŭe! Ŝajne mi estas en malfavoro!

KRISTINA.

Estas favoro suferi senkulpe ... ne lasu logi vin al malpacienco ... Eltenu la provon, ĉar estas nur provo, mi sentas tiel ...

ELIS.

Ĉu jaro povos esti pli mallonga por Benjamin ol tricent sesdek kvin tagoj?

KRISTINA.

Jes, gaja menso mallongigas la tempon!

ELIS (ridetas).

Blovu sur la vundon, kaj ĝi saniĝos, oni diras al infanoj!

KRISTINA.

Estu infano, kaj mi diros tiel ... Pensu pri patrino ... kiel ŝi portas ĉion!

ELIS.

Donu al mi vian manon; mi profundigas!

KRISTINA (donas la manon).

ELIS.

Via mano tremas ...

KRISTINA.

Ne, mi ne sentas tion ...

ELIS.

Vi ne estas tiel forta, kiel vi montras vin ...

KRISTINA.

Mi ne sentas malfortecon ...

ELIS.

Kial vi do ne povas doni al mi forton?

KRISTINA.

Mi ne havas superflue da ĝi!

ELIS (elrigardas tra la fenestro).

Ĉu vi scias, kiu nun venas?

KRISTINA

(rigardas tra la fenestro; ekĝenuas, frakasita).

Estas tro multe!

ELIS.

La kreditoro, li kiu povas preni niajn meblojn kiam ajn, Lindkvist, kiu venis tien ĉi por sidi kiel araneo meze en la reto kaj gardi la muŝojn ...

KRISTINA.

Fuĝu!

ELIS.

Ne! Ne fuĝi! ... Nun, kiam vi malfortiĝis, mi fortiĝis ... jen li alvenas sur la strato ... kaj jam ĵetis siajn malicajn rigardojn sur la kaptaĵon ...

KRISTINA.

Iru flanken, almenaŭ!

ELIS.

Ne, nun li amuzas min ... Li ŝajnas heliĝi, kvazaŭ li vidus la kaptaĵon en kaptilo ... Venu nur! ... Li kalkulas la paŝojn al la barilpordo, kaj pro la malfermita pordo li vidis, ke ni estas hejme ... Sed nun li renkontis iun kaj haltas por babili ... Li parolas pri ni, ĉar li rigardas tien ĉi ...

KRISTINA.

Se li nur ne renkontos patrinon tie ĉi, kaj ŝi per koleraj vortoj faros lin nepaciĝema ... Evitigu tion, Elis!

ELIS.

Nun li skuas la bastonon, kvazaŭ li ĵurus, ke tie ĉi kompatato ne anstataŭos justecon! ... Li malbutonas la surtuton por montri, ke oni ankoraŭ ne prenis la vestojn de la korpo ... Mi vidas sur lia buŝo, kion li diras ... Kion mi respondu al li ... »Sinjoro, vi estas prava! Prenu ĉion, ĝi apartenas al vi!» ...

KRISTINA.

Nur tion diru!

ELIS.

Nun li ridas! Sed afable, ne malice! Eble li ne estas tiel malica, kvankam li volas havi sian monon! Se li nur volus veni nun kaj fini la malbenitan babladon ... jen la bastono ree moviĝas ... ili ĉiam havas bastonojn, tiuj kiuj havas nepagitajn bonhavojn ... kaj ledgaloŝojn, kiuj diras »vitŝ, vitŝ» tute kiel vergoj en la aero ...

(Metas la manon de Kristina sur sian korflankon.)

... ĉu vi sentas, kiel batas mia koro ... mi mem aŭdas ĝin kiel oceanŝipegon en la dekstra orelo ... Nu, Dio, jen li adiaŭas! ... Kaj la galoŝoj! »Vitŝ, vitŝ» kiel la fastotempa branĉeto ... sed li havas brelokojn! Do li ne estas tute malriĉa! Ĉiam ili havas brelokojn el karneolo kvazaŭ malnovan karnon, kiun ili tranĉis el dorsoj de proksimuloj ... aŭdu la galoŝojn ... »lupoj, lupoj, gluti, gluti, gluti, vitŝ, vitŝ!» Atentu! Li vidas min! Li vidas min! ... (Salutklinas sin al la strato.) ... Li salutas unua! Li ridetas! Li mansalutas ... kaj ...

(Plorante falsidiĝas apud la skribtablo.)

Li preteriris!

KRISTINA.

Dank' al Dio!

ELIS.

Li preteriris! ... Sed li revenos! ... Ni eliru en la sunon.

KRISTINA.

Kaj la tagmango kun Petro?

ELIS.

Ĉar mi ankoraŭ ne estas invitita, mi cedas! Cetere, kion mi faru tie en la gajeco! Renkonti malfidelan amikon! Mi nur suferus en lia nomo, tiel ke mi ne sentus min ofendita en mia propra!

KRISTINA.

Dankon pro tio, ke vi restas ĉe ni!

ELIS.

Tion mi plej ŝatas! Kiel vi scias ... Ĉu ni eliru?

KRISTINA.

Jes, tiun ĉi vojon! (Eliras maldekstre.)

ELIS

(preterirante karesfrapas la kapon de Benjamin).

Kuraĝon, knabo!

BENJAMIN

(kaŝas la vizaĝon en la manoj).

ELIS

(prenas la branĉeton de la mangotablo kaj metas ĝin malantaŭ la spegulon).

Ne estis oliva branĉeto, kiun alportis la kolombo — estis betula!

(Eliras.)

*

ELEONORA

envenas de la fono; deksejara knabino kun harplekto sur la dorso. Ŝi portas flavan paskolilion en florkruĉo. Sen vidi, aŭ ŝajnigante ne vidi, Benjamin'on, ŝi prenas akvokarafon de la bufedo kaj akvas la floron, metas ĝin sur la mangotablon, sidiĝas apud tiu tablo rekte kontraŭ Benjamin, rigardas lin kaj imitas liajn movojn.

BENJAMIN

(rigardas ŝin surprizite).

ELEONORA

(kun gesto al la paskolilio).

Ĉu vi scias, kio estas tio?

BENJAMIN (infanece, simple).
Estas ja paskolilio, kompreneble! . . . Sed kiu estas vi?

ELEONORA (amikece, malĝoje).
Nu, kiu estas vi?

BENJAMIN (kiel antaŭe).
Mi nomiĝas Benjamin, kaj mi loĝas ĉi tie ĉe sinjorino Heyst.

ELEONORA.
Tiel! Mi nomiĝas Eleonora kaj estas filino en tiu ĉi domo.

BENJAMIN.
Strange, ke oni neniam parolis pri vi!

ELEONORA.
Oni ne parolas pri la mortintoj!

BENJAMIN.
Mortintoj!

ELEONORA.
Mi estas civitane mortinta, ĉar mi faris tre malbonan agon.

BENJAMIN.
Vi!

ELEONORA.
Jes, mi detruis kuratoran monon — kaj tio ne tre gravus, ĉar maljuste akirita estos perdita — sed tio, ke oni kulpigis mian maljunan patron kaj metis lin en malliberejon, vidu, tio neniam estos pardonebla.

BENJAMIN.
Kiel strange kaj bele vi parolas . . . Kaj neniam mi pensis pri tio, ke mia heredaĵo povus esti maljuste akirita.

ELEONORA.
Oni ne devas ligi la homojn, sed malligi ilin.

BENJAMIN.
Jes, vi malligis min de la ĉagreno, ke mi estas trompita.

ELEONORA.
Vi do estas zorgato . . .

BENJAMIN.
Jes, kaj ricevis la malgajan sorton loĝi ĉe tiuj ĉi malriĉaj homoj por pagi ilian ŝuldon.

ELEONORA.
Ne uzu krudajn vortojn, alie mi foriros; mi estas tiel mola, ke mi ne eltenas ion malmolan! Sed jen . . . tion vi suferas pro mi?

BENJAMIN.
Pro via patro!

ELEONORA.
Estas same, ĉar li kaj mi estas unu kaj sama persono . . . (Paŭzo.) Mi estis tre malsana . . . kial vi estas tiel malĝoja?

BENJAMIN.
Mi havis malagrablaĵon!

ELEONORA.
Ĉu vi malĝojas pro tio? »Vergado kaj puno donas saĝecon, sed kiu punon malamas, tiu devas morti . . .» Kian malagrablaĵon vi havis?

BENJAMIN.
Mi ricevis subateston en la latinskribo — kvankam mi estis tute certa.

ELEONORA.
Tiel, vi estis tute certa, tiel certa, ke vi povis veti pri sukceso.

BENJAMIN.
Tion mi ankaŭ faris!

ELEONORA.

Mi preskaŭ kredis tion! Vidu, tiel okazis, ĉar vi estis tiel certa.

BENJAMIN.

Ĉu vi kredas, ke tio estis la kaŭzo?

ELEONORA.

Certe! Post fiero venas falo!

BENJAMIN.

Do mi memoros tion venontan fojon.

ELEONORA.

Prave vi pensas; kaj la ofero, kiu plaĉas al Dio — estas pentofara animo.

BENJAMIN.

Ĉu vi estas religiulo?

ELEONORA.

Jes, mi estas religiulino!

BENJAMIN.

Kredanto, mi volas diri!

ELEONORA.

Jes, mi volas diri la samon. Tial, se vi parolas malbone pri Dio, mia bonfaranto, mi ne plu sidos ĉe la sama tablo kiel vi!

BENJAMIN.

Kiom aĝa vi estas?

ELEONORA.

Por mi ne ekzistas tempo kaj spaco; mi estas ĉie kaj kiam ajn! Mi estas en la malliberejo de mia patro kaj en la klasĉambro de mia frato, mi estas en la kuirejo de mia patrino kaj en la butikoj de fratino malproksime en Ameriko. Kiam bone iras por mia

fratino kaj ŝi povas vendi, tiam mi sentas ŝian ĝojon, kaj mi suferas, kiam iras malbone por ŝi, sed plej mi suferas, kiam ŝi agas maljuste. Benjamin, vi nomiĝas Benjamin, ĉar vi estas la plej juna el miaj amikoj ... jes, ĉiuj homoj estas miaj amikoj ... se vi permesas al mi aligi vin, mi suferos ankaŭ por vi.

BENJAMIN.

Verdire mi ne komprenas viajn vortojn, sed ŝajnas al mi, ke mi perceptas la sencon de viaj pensoj! Kaj de nun mi volas ĉion, kion vi volas!

ELEONORA.

Se vi do, kiel komenco, ne plu juĝos homojn, ankaŭ tiujn, kiuj pruvite estas krimuloj ...

BENJAMIN.

Jes, sed mi volas havi motivon por tio! Vidu, mi lernis filozofion!

ELEONORA.

Ĉu vere! Do helpu al mi interpreti tion de granda filozofo. Li nome diras: »Tiuj, kiuj malamas la justulon, estos krimuloj.«

BENJAMIN.

Laŭ ĉiu logiko tio signifas, ke oni povas esti verdiktata fari krimon ...

ELEONORA.

Kaj ke la krimo mem estas puno.

BENJAMIN.

Tio vere estas profunda! Oni povus kredi, ke estas Kant aŭ Schopenhauer.

ELEONORA.

Ne konas ilin!

BENJAMIN.

En kiu libro vi legis tion?

ELEONORA.

En la Sankta Skribo!

BENJAMIN.

Vere? Ĉu tiaj aferoj troviĝas tie?

ELEONORA.

Kia malklera, needukita infano vi estas! Se mi povus eduki vin!

BENJAMIN.

Etulino!

ELEONORA.

Sed certe estas nenio malbona en vi. Prefere vi aspektas bona . . . Kiel nomiĝas via instruisto en latino?

BENJAMIN.

Lektoro Ahlgren!

ELEONORA.

Tion mi memoros! . . . Ho, nun mia patro tre suferas! Ili estas malbonaj al li.

(Staras senmove kvazaŭ aŭskultante.)

Ĉu vi aŭdas, ke kantas la telefondratoj . . . estas la krudaj vortoj, kiujn la mola, belruĝa kupro ne povas toleri . . . kiam la homoj kalumnias unu la alian en la telefono, tiam plendas la kupro, kaj akuzas . . . — (Forte.) — kaj ĉiu vorto estas skribata en la libro . . . kaj je la fino de la tempo venos la kalkulo!

BENJAMIN.

Kiel severa vi estas!

ELEONORA.

Ne mi, ne mi! Kiel mi kuraĝus? Mi, mi?

(Ŝi iras al la ferforno kaj malfermas la pordeton; elprenas kelkajn disŝiritajn slipojn de blanka leterpapero.)

BENJAMIN

(leviĝas kaj rigardas la paperojn, kiujn Eleonora ordigas sur la manĝotablo).

ELEONORA (al si).

Ke homoj estas tiel senpensaj, ke ili metas siajn sekretojn en fornojn . . . Kien ajn mi venas, mi tuj iras al la forno! Sed mi neniam misuzas tion, tion mi ne kuraĝus, ĉar tiam mi suferus! . . . Kio do estas tio? (Legas.)

BENJAMIN.

Estas licenciato Petro, kiu skribas kaj interkonsentas pri renkonto kun Kristina . . . Tion mi longe atendis!

ELEONORA.

(metas la manon sur la paperojn).

Ho, vi, kion vi atendis? Diru, vi malbona homo, kiu kredas nur malbonon! Tiu ĉi letero alportos nur bonon, ĉar mi konas Kristinan, kiu estos mia bofratino. Kaj tiu renkonto evitigos malfeliĉon al frato Elis . . . Ĉu vi promesas silenti, Benjamin?

BENJAMIN.

Mi kredas, ke mi ne kuraĝus paroli pri tio!

ELEONORA.

Kiel malprave de la homoj havi sekretojn . . . ili kredas sin saĝaj sed estas malsaĝuloj! . . . Sed kial mi iris tien!

BENJAMIN.

Jes, kial vi estas scivolema?

ELEONORA.

Vidu, tio estas mia malsano, ke mi devas scii ĉion, alie mi maltrankviliĝas . . .

BENJAMIN.

Scii ĉion?

ELEONORA.

Estas manko, kiun mi ne povas venki. Tamen mi scias, kion diras la sturnoj.

BENJAMIN.

Ili ja ne povas paroli?

ELEONORA.

Ĉu vi ne aŭdis sturnojn, kiujn oni instruis paroli?

BENJAMIN.

Jes, kiujn oni instruis!

ELEONORA.

Sekve sturnoj povas lerni paroli! Jen troviĝas tiaj, kiuj instruas sin mem, estas aŭtodidaktoj ... kompreneble ili sidas kaj aŭskultas, sen ke ni scias, kaj poste ili imitas. Ĵus, kiam mi venis, mi aŭdis du, kiuj sidis kaj babilis sur la juglandarbo.

BENJAMIN.

Kiel amuza vi estas? Sed kion ili do diris?

ELEONORA.

Jen! »Petro« — diris unu. »Judas« diris la alia — »Same multe« diris la unua. — »Fi, fi, fi!« diris la dua. Sed ĉu vi rimarkis, ke la najtingaloj kantas nur en la ĝardeno de la surdmutuloj tie ĉi apude?

BENJAMIN.

Jes, tio estas konata! Sed kial?

ELEONORA.

Ĉar tiuj, kiuj povas aŭdi, ne aŭdas kion diras la najtingaloj; sed tion faras la surdmutuloj!

BENJAMIN.

Rakontu pli da fabeloj!

ELEONORA.

Jes, se vi estas bona!

BENJAMIN.

Kiom bona?

ELEONORA.

Neniam disputu pri miaj vortoj, kaj neniam diru, ke tiel vi diris tiam, kaj tiam vi diris tiel ... Ĉu mi parolu ankoraŭ pri birdoj! Estas malica birdo, kiu nomiĝas mus-buteo; kiel la nomo diras, ĝi vivas de musoj. Sed ĉar ĝi estas malica birdo, ĝi laŭdire malfacile kaptas la musojn. Tial ĝi povas diri nur unu vorton, kaj ĝi sonas, kiel la kato diras »miaŭ«. Kiam la buteo jen diras »miaŭ«, tiam la musoj kaŝas sin ... sed la buteo ne komprenas, kion ĝi mem diras — sed manĝaĵo ofte mankas al ĝi, ĉar ĝi estas malica! — Ĉu vi volas aŭdi pli? Aŭ ĉu mi parolu pri floroj? ... Jen, kiam mi estis malsana, mi devis preni drogon de hiskiamo, kiu havas la kvaliton, ke ĝi faras grandigvitron el la okulo ... Male la beladono faras tiel, ke oni vidas ĉion malgrandigita ... Bone, nun mi povas vidi pli malproksimen ol aliaj, kaj mi povas vidi la stelojn meze en la tago!

BENJAMIN.

Sed tiam la steloj ja ne estas sur la ĉielo?

ELEONORA.

Kiel amuza vi estas! La steloj ja ĉiam estas sur la ĉielo ... kaj nun mi sidas alnorde kaj rigardas Kasiopea'n, kiu similas al duobla v kaj sidas meze en la Lakta vojo ... ĉu vi povas vidi ĝin?

BENJAMIN.

Ne, tion mi ne povas.

ELEONORA.

Jen rimarku, ke unu homo p o v a s vidi tion, kion la alia ne vidas ... Tial ne estu tiel certa pri v i a j

okuloj! ... Nun mi volas paroli pri tiu ĉi floro, kiu staras sur la tablo ... Estas paska lilio, kiu estas hejme en Svisujo ... ĝi havas kalikon, kiu trinkis sunlumon, tial tiu estas flava kaj trankviligas dolorojn ... Mi ĵus preteriris florvendejon, vidis ĝin kaj volis donaci ĝin al frato Elis ... Kiam mi en la pord-ejo volis eniri en la butikon, mi trovis la pordon fermita ... nome estas konfirmo hodiaŭ ... Ĉar mi devis havi la floron, mi elprenis miajn ŝlosilojn kaj provis ... ĉu vi povas imagi, mia pordŝlosilo konvenis ... Mi eniris ... Jes, ĉu vi komprenas la silentan lingvon de la floroj? Ĉiuodoro esprimas amason da pensoj, kaj tiuj pensoj atakis min; kaj per mia pli-grandigita okulo mi vidis en iliajn laboratoriojn, kiujn neniu vidis. Kaj ili parolis al mi pri siaj ĉagrenoj, kiujn kaŭzis al ili la malsaĝa ĝardenisto — mi ne diras kruela — ĉar li estas nur senpripensa! ... metis unu kronon kaj mian karton sur la vendotablon — prenis la floron kaj foriris.

BENJAMIN.

Kiel senpripense! Jen, se oni vidos, ke la floro estas for kaj ne trovos la monon?

ELEONORA.

Estas vero! Vi pravas.

BENJAMIN.

Monero ja povas malaperi, kaj se oni trovos nur vian karton, vi estos perdita!

ELEONORA.

Tamen neniu povos kredi, ke mi volis preni ion?

BENJAMIN (fiksrigardas ŝin).

Ĉu ne?

ELEONORA

(rigardas lin kaj leviĝas).

Ho! Mi scias, kion vi volas diri! Kia patro, tia in-

fano! Kiom senpripensa mi estis! Kiom! ... Nu! kio devas okazi, tio okazos! (Sidiĝas.) Okazu do!

BENJAMIN.

Ĉu oni ne povos ordigi tion ...

ELEONORA.

Silentu! Kaj parolu pri io alia! ... Lektoro Ahlgren! ... Kompatinda Elis! Kompatindaj ni ĉiuj! Sed estas pasko, kaj ni devas suferi. Estos ja koncerto morgaŭ, kaj oni ludos »La sep vortoj sur la kruco» de Haydn! »Patrino, vidu vian filon!» (Ŝi ploras en la manoj.)

BENJAMIN.

Kian malsanon vi havis?

ELEONORA.

Tiu malsano ne estas mortiga sed por la gloro de Dio! »Mi atendis bonon, sed venis malbono; mi atendis lumon, sed venis mallumo!» ... Kia estis via infanaĝo, Benjamin?

BENJAMIN.

Mi ne scias. Malgaja! Kaj la via?

ELEONORA.

Mi neniam havis. Mi naskiĝis maljuna ... Mi sciis ĉion, kiam mi naskiĝis, kaj kiam mi lernis ion, tio estis nur kiel memoroj. Mi konis la ... senpripensecon kaj malsaĝon de la homoj, kiam mi estis kvarjara, kaj tial oni estis malbona al mi!

BENJAMIN.

Ŝajnas al mi, ke ankaŭ mi pensis ĉion, kion vi diras!

ELEONORA.

Tion vi certe faris! ... Kial vi kredis, ke mia monero malaperos en la florvendejo?

BENJAMIN.

Ĉar ĉiam okazas tio, kio estas malagrabla!

ELEONORA.

Ankaŭ vi rimarkis tion!... Silentu, iu venas!
(Rigardas al la fono.) Mi aŭdas... estas Elis!... Ho, kia ĝojo!... Mia sola amiko sur la tero!... (Ŝi malheliĝas.) Sed... li ne atendas min! Kaj li ne ĝojos, kiam li vidos min! Ne, li ne ĝojos!... Certe ne! — Benjamin, Benjamin, montru afablan vizaĝon kaj gajan humoron, kiam venos mia kompatinda frato. Mi eniros tien, kaj vi sciigu al li mian alvenon. Sed atentu, neniujn malmolajn vortojn, tio suferigus min! Donu al mi vian manon!

BENJAMIN (donas la manon).

ELEONORA

(kisas la supron de lia kapo).

Tiel! Nun vi estas mia malgranda frato! Dio benu kaj gardu vin!

(Eliras maldekstre kaj preterpase afable karesfrapas la manikon de la surtuto de Elis.)

Kompatinda Elis!

*

ELIS

(envenas de la fono, ĉagrenita).

S-INO HEYST (venas el la kuirejo).

ELIS.

Jen vi ja estas, patrino!

S-INO HEYST.

Ĉu estis vi? Ŝajnis al mi, ke estas fremda voĉo!

ELIS.

Mi havas novaĵojn! Renkontis sur la strato la advokaton!

S-INO HEYST.

Nuu?

ELIS.

La proceso iros al la dua instanco... kaj por gajni tempon mi devas tralegi ĉiujn procesajn protokolojn.

S-INO HEYST.

Nu, tion vi rapide faros!

ELIS.

Ho! Mi kredis, ke estas preta; sed jen mi devas trasuferi tiun tutan pasiotempan historion — ĉiujn akuzojn, ĉiujn atestojn, ĉiujn pruvojn! Denove!

S-INO HEYST.

Jes, sed oni tamen senkulpigos lin en la dua instanco!

ELIS.

Ne, patrino; li ja konfesis!

S-INO HEYST.

Jes, sed tio povas esti formala eraro, diris la advokato lastfoje, kiam mi parolis kun li!

ELIS.

Tion li diris por konsoli vin!

S-INO HEYST.

Vi ne iros al la tagmanĝo?

ELIS.

Ne!

S-INO HEYST.

Jen vi ree ŝanĝis decidon!

ELIS.

Jes!

S-INO HEYST.

Estas malbone fari tiel!

ELIS.

Mi scias, sed mi ja estas ĵetata kiel lignosplito inter kontraŭaj ondoj.

S-INO HEYST.

Precize ŝajnis al mi, ke mi aŭdas fremdan voĉon, kiun mi rekonas! — Sed verŝajne mi eraris! (Montras al la surtuto.) Mi diris, ke tiu surtuto ne pendu tie! (Eliras dekstre.)

ELIS

(tiras sin maldekstren; ekvidas la paskolilion sur la manĝotablo. Al Benjamin.)

De kie venis tiu floro?

BENJAMIN.

Juna virino alportis ĝin!

ELIS.

Virino! Kion tio signifas? Kiu estis?

BENJAMIN.

Estis...

ELIS.

Ĉu estis... mia fratino?

BENJAMIN.

Jes!

ELIS

(falsidiĝas ĉe la manĝotablo).

(Paŭzo.)

ELIS.

Ĉu vi parolis kun ŝi?

BENJAMIN.

Jes ja!

ELIS.

Ho Dio, ĉu ne baldaŭ sufiĉos!... Ĉu ŝi estis malica al vi?

BENJAMIN.

Ŝi? Ne, ŝi estis tre, tre afabla!

ELIS.

Strange!... Ĉu ŝi parolis pri mi? Ĉu ŝi tre kole-
ris kontraŭ mi?

BENJAMIN.

Ne! Tute male! Ŝi diris, ke vi estas ŝia plej bona, sola amiko sur la tero...

ELIS.

Kia stranga ŝanĝiĝo!

BENJAMIN.

Kaj kiam ŝi foriris, ŝi karesfrapis vian surtuton tie, sur la manikon...

ELIS.

Foriris? Kien?

BENJAMIN

(montras al la maldekstra pordo).

Tien!

ELIS.

Ŝi do estas tie?

BENJAMIN.

Jes!

ELIS.

Vi aspektas ĝoja kaj afabla, Benjamin.

BENJAMIN.

Ŝi parolis tiel bele al mi...

ELIS.

Pri kio ŝi parolis?

BENJAMIN.

Ŝi rakontis fabelojn, kaj plue estis multe pri religio...

ELIS (leviĝas).

Kio ĝojigis vin.

BENJAMIN.

Jes!

ELIS.

Kompatinda Eleonora, kiu mem estas tiel malferma kaj povas ĝojigi aliajn!

(Eliras maldekstre, hezite.)

Dio helpu min!

DUA AKTO.

Sankta Vendredo.

Muziko antaŭ tiu akto:

HAYDN:

Sieben Worte.

Largo N:o 1. "Pater dimitte illis."

La sama dekoracio, sed la kurtenoj antaŭtiritaj kaj de ekstere prilumataj de la gaslanterno. La plafonlampo lumigita; sur la manĝotablo staras lumigita petrola lampeto. Fajro en la glimpordeta forno.

Ĉe la kudrotablo sidas ELIS kaj KRISTINA senokupaj. Ĉe la manĝotablo sidas ELEONORA kaj BENJAMIN kaj legas, unu kontraŭ la alia kaj kun la lampo meze inter si. Eleonora havas ŝalon sur la ŝultroj.

Ĉiuj estas nigre vestitaj: Elis kaj Benjamin havas blankajn kravatojn.

Sur la skribtablo kuŝas la procesaj aktoj dissternitaj. Sur la kudrotablo staras la paska lilio. Sur la manĝotablo staras malnova pendolhorloĝo.

Tiam kaj tiam vidiĝas sur la kurtenoj ombro de preterpasanto sur la strato.

ELIS (duonlaŭte al Kristina).

Jes, Sankta vendredo! Sed tiom terure longa! Kaj sur la stratŝtonoj kuŝas la neĝo kiel pajlo antaŭ la loĝejo de mortanto; ĉiu sono silentiĝis — krom la bazoj de la orgeno, kiujn mi aŭdas eĉ tie ĉi...

KRISTINA.

Patrino ŝajne iris al la vespera diservo...

ELIS.

Jes, ĉar ŝi ne kuraĝis iri al la tagmeza ... la rigardoj de la homoj vundas ŝin ...

KRISTINA.

La homoj estas strangaj; ili postulas, ke ni ĉiuj restu flanke, ili opinias tion deca ...

ELIS.

Jes, kaj eble ili pravas ...

KRISTINA.

Pro la mispaŝo de unu oni forpuŝas la tutan familion ...

ELIS.

Jes, tiel estas!

ELEONORA

(ŝovas la lampon al la flanko de Benjamin, por ke li vidu pli bone).

ELIS

(sugestas pri Eleonora kaj Benjamin).

Rigardu tiujn!

KRISTINA.

Ĉu ne estas bele! ... Kiel bone ili harmonias!

ELIS.

Kia feliĉo, ke Eleonora estas tiel trankvila! Ho, tio nur daŭru!

KRISTINA.

Kial do ne?

ELIS.

Ĉar ... la feliĉo kutime ne daŭras longe. En tiu ĉi tago mi timas ĉion!

BENJAMIN

(transŝovas la lampon al Eleonora, por ke ŝi vidu pli bone).

KRISTINA.

Rigardu ilin!

ELIS.

Ĉu vi rimarkis, kiel Benjamin ŝanĝiĝis? La obtuza spito donis lokon al kvietaj submetiĝoj ...

KRISTINA.

Kiel dolĉa estas ŝia tuta estaĵo — oni ne volas uzi la vorton bela!

ELIS.

Kaj ŝin akompanis pacanĝelo, kiu ĉirkaŭiras nevidebla kaj disradias kvietan trankvilon ... Eĉ patrino montris trankvilon, kiam ŝi ekvidis ŝin, trankvilon, kian mi ne atendis!

KRISTINA.

Ĉu vi kredas, ke ŝi nun resaniĝis?

ELIS.

Jes, se ne restus tiu troa sentemo. Ŝi nun legas Historion pri la Suferoj de Kristo, kaj foje ŝi ploras.

KRISTINA.

Nu, mi memoras, ke ankaŭ ni faris tion en la lernejo merkrede dum la fasto ...

ELIS.

Ne parolu tiel laŭte, ŝi tre bone aŭdas!

KRISTINA.

Ne nun! Ŝi estas malproksime!

ELIS.

Ĉu vi rimarkis, ke la trajtoj de Benjamin iel digniĝis, nobliĝis?

KRISTINA.

Estas la sufero; la ĝojo ĉion banaligas.

ELIS.

Eble prefere estas... amo! Ĉu vi ne kredas, ke tiuj etuloj...

KRISTINA.

Silentu, silentu... ne tuŝu la flugilojn de la papilio! Alie ĝi flugos for!

ELIS.

Certe ili rigardas unu la alian kaj nur ŝajnigas legi, ĉar ili ne turnas la paĝojn, kiom mi povas aŭdi.

KRISTINA.

Silentu!

ELIS.

Jen, nun ŝi ne povas regi sin...

ELEONORA

(leviĝas, iras piedpinte al Benjamin kaj metas sian ŝalon sur liajn ŝultrojn. Benjamin milde kontraŭstaras, sed cedas; poste Eleonora reiras kaj sidiĝas kaj ŝovas la lampon al la flanko de Benjamin).

KRISTINA.

Si volas montri sian tutan afablecon, kompatinda Eleonora.

ELIS (leviĝas).

Nun mi reiros al miaj aktoj.

KRISTINA.

Ĉu vi vidas sencon en tiu legado?

ELIS.

Nur unu; konservi la esperon de patrino! Sed kvankam ankaŭ mi nur ŝajnigas legi, vortoj tamen restas kiel dornoj en la fundo de mia okulo. La diroj de la atestantoj, ciferaĵoj sumoj, la konfeso de pat-

ro... tiel: »la akuzito konfesis kun larmoj«... Tio da larmoj, tio da larmoj. Kaj tiuj paperoj... kun siaj stampoj, kiuj memorigas pri falsaj monbiletoj aŭ malliberejaj seruroj; kaj la ŝnuroj kaj la ruĝaj sigeloj... ili similas al la kvin vundoj de Jesuo... kaj la frazoj, kiuj ne havas finon — al la eternaj suferoj... Estas laboro por la Sankta vendredo... Hieraŭ lumis la suno, hieraŭ ni veturis kamparen, en la pensoj... Kristina... imagu, se ni devos resti tie ĉi dum la somero!

KRISTINA.

Ni ŝparus multe da mono... sed estus malgaje!

ELIS.

Mi ne travivus tion... Tri somerojn mi loĝis tie ĉi... kaj estas kiel en tombo. Meze de la tago, kaj oni vidas la longan, grizan straton serpenti kiel tranĉeo, neniun homon, neniun ĉevalon, neniun hundon... Sed el la kloakelfluejoj elvenas la ratoj, ĉar la katoj somerumas... Kaj malantaŭ la reflektspieguloj sidas kelkaj restantoj kaj observas la vestojn de siaj proksimuloj... »Jen, tiu portas vintran kostumon!«... kaj la oblikvaj kalkanumoj de siaj proksimuloj kaj iliajn erarojn... Kaj el la kvartaloj de la malriĉuloj elrampas kripluloj, kiuj antaŭe sin kaŝis, homoj sen nazoj kaj oreloj, malicaj homoj kaj malfeliĉaj... Kaj ili sidas en la granda promenejo kaj sunas sin, kvazaŭ konkerintoj de la urbo... kie ĵus ludis belaj, bonvestitaj infanoj dum karesaj, vigligaj vortoj de belaj patrinoj, tie nun svarmas aroj da ĉifonuloj, kiuj insultas kaj suferigas unu la alian... Mi memoras Johanotagon antaŭ du jaroj!

KRISTINA.

Elis, Elis! Rigardu antaŭen, antaŭen!

ELIS.

Ĉu estas pli hele tie?

KRISTINA.

Ni esperu tion!

ELIS

(sidiĝas ĉe la skribtablo).

Se nur ĉesus neĝi! Kaj oni povus eliri kaj promeni!

KRISTINA.

Kara amiko, hieraŭ vespere vi deziris, ke la mallumo revenu, por ke la homoj ne vidu nin ... »La mallumo estas tiel agrabla kaj bonfara«, vi diris; »estas kvazaŭ kaŝi la kapon sub la litkovrilo!«

ELIS.

Vi do vidas, ke la mizero estas same granda en ambaŭ okazoj ... (Legas en la paperoj.) La plej terura en tiu ĉi proceso tamen estas la impertinentaj demandoj pri la vivmaniero de mia patro ... Jen staras, ke ni aranĝis brilajn festenojn ... Unu atestanto diras, ke li drinkis! ... Ne, estas tro! Mi ne povas plu! ... Sed mi tamen devas ... ĝis la fino ... Ĉu vi ne sentas malvarmon?

KRISTINA.

Ne, sed varme ne estas! ... Lina ne estas hejme?

ELIS.

Ŝi iris por konfesi, vi ja scias.

KRISTINA.

Verŝajne panjo baldaŭ venos hejmen?

ELIS.

Mi ĉiam timas, kiam ŝi venas de ekstere, ĉar ŝi tiom aŭdis, kaj tiom vidis ... kaj ĉio estas malbona.

KRISTINA.

Estas neordinare peza humoro en via familio.

ELIS.

Tial nur pezhumoraj homoj volis interrili kun ni! La gajaj evitis nin!

KRISTINA.

Nun panjo venis en la kuireja pordo!

ELIS.

Ne estu malpacienca al ŝi, Kristina!

KRISTINA.

Ho ne! Certe ŝi plej suferas el ni ĉiuj! Sed mi ne komprenas ŝin!

ELIS.

Ŝi laŭpove kaŝas sian honton, kaj tial ŝi fariĝas nekomprenebla. Kompatinda patrino!

*

S-INO HEYST

(eniras; nigre vestita, kun himnlibro kaj naztuko en la mano).

Bonan vesperon, infanoj.

ĈIUJ

(krom Benjamin, kiu silente salutas).

Bonan vesperon, panjo!

S-INO HEYST.

Ĉiuj vi estas nigre vestitaj, kvazaŭ vi funebrus.

(Silento.)

ELIS.

Ĉu ankoraŭ neĝas?

S-INO HEYST.

Jes, falas malseka neĝo! Vi havas malvarme tie ĉi! ...

(Iras al Eleonora kaj karesfrapas ŝin.)

Nu, etulino, mi vidas, ke vi legas kaj studas! (Al Benjamin.) Sed vi ne estas tro studema!

ELEONORA

(prenas la manon de la patrino kaj metas ĝin al siaj lipoj).

S-INO HEYST

(subpremas sian emocion).

Nu, mia infano! Nu, nu! ...

ELIS.

Vi estis en la vespera diservo, panjo!

S-INO HEYST.

Jes, estis la urba subparoĥestro; kaj mi ne ŝatas lin.

ELIS.

Ĉu vi renkontis iun konaton?

S-INO HEYST.

(sidiĝas ĉe la kudrotablo).

Pli bone estus renkonti neniun!

ELIS.

Do mi scias kiun ...

S-INO HEYST.

Lindkvist! Kaj li venis al mi ...

ELIS.

Kiel kruele, kiel kruele.

S-INO HEYST.

Demandis, kiel mi fartas ... kaj, imagu mian terurigon, demandis, ĉu li povos fari viziton hodiaŭ vespere.

ELIS.

En festotaga vespero?

S-INO HEYST.

Mi mutiĝis! Kaj li prenis mian silenton kiel konsenton! (Paŭzo.) Li povos veni kiam ajn!

ELIS (leviĝas).

Tien ĉi? Nun?

S-INO HEYST.

Li diris, ke li volas transdoni paperon, kiu urĝas.

ELIS.

Li volas preni la meblojn.

S-INO HEYST.

Sed li tiel strange aspektis ... mi ne komprenis lin!

ELIS.

Li do venu. La justeco estas liaflanke, kaj ni devas submetiĝi. Ni devas akcepti lin en deca maniero, kiam li venos.

S-INO HEYST.

Se mi nur ne bezonos vidi lin!

ELIS.

Nu, vi povos resti en la ĉambroj ...

S-INO HEYST.

Sed la meblojn li ne prenu. Kie ni loĝus, se li forprenus ĉiujn objektojn? Oni ja ne povas resti en malplenaj ĉambroj! Ja!

ELIS.

La vulpoj havas kavernojn kaj la birdoj nestojn, ekzistas senhejmuloj, kiuj loĝas en la arbaro.

S-INO HEYST.

Tie la friponoj devus loĝi sed ne honestaj homoj.

ELIS (apud la skribtablo).

Nun mi legos, patrino!

S-INO HEYST.

Ĉu vi ne trovis eraron?

ELIS.

Ne, mi kredas, ke ekzistas neniue!

S-INO HEYST.

Sed mi ĵus renkontis la urban notarion, kaj li diris, ke povus esti iu formala eraro, iu netaŭga atestanto, iu nepruvita aserto aŭ iu kontraŭdira atesto. Certe vi ne legas zorge!

ELIS.

Tamen, patrino, sed estas tiel turmente ...

S-INO HEYST.

Aŭdu, mi ĵus renkontis la urban notarion — vere, tion mi ja diris — kaj li rakontis pri ŝtelenrompo, okazis en la urbo hieraŭ, meze en la hela tago.

(Eleonora kaj Benjamin ekaŭskultas.)

ELIS.

Enrompo? Tie ĉi en la urbo? Kie?

S-INO HEYST.

Laŭdire estis en la florvendejo en la Monaĥeja strato. Ĉio estis tre stranga. Estis tiel: la vendisto fermis sian butikon por iri al la preĝejo, kie lia filo ... eble estis la filino, estos konfirmata. Jen kiam li revenis ĉirkaŭ la tria, eble estis la kvara, sed tio ja ne gravas ... nu, tiam la butika pordo estis malfermita kaj floroj mankis, tuta amaso, speciale flava tulipo, kion li unue rimarkis!

ELIS.

Tulipo! Se estus lilio, mi ektimus.

S-INO HEYST.

Ne, estis tulipo, tio estas tute certa. Jes, kaj nun la polico moviĝas.

(ELEONORA leviĝas, kvazaŭ ŝi volos paroli, sed BENJAMIN iras al ŝi kaj flustras ion.)

S-INO HEYST.

Imagu, fari enrompon eĉ en la sankta ĵaŭdo, kiam la gejunuloj konfirmiĝas ... Nur friponoj, la tuta

urbo! Kaj tial oni metas senkulpajn homojn en mal-liberejon.

ELIS.

Ĉu oni ne suspektas ion?

S-INO HEYST.

Ne! Sed estis stranga ŝtelisto, ĉar li ne prenis monon el la ŝanĝokaso ...

KRISTINA.

Ho, se tiu ĉi tago estus finita!

S-INO HEYST.

Kaj se Lina nur venus hejmen! ... Jes, mi aŭdis pri la tagmanĝo de Petro hieraŭ! Eĉ la guberniestro ĉeestis.

ELIS.

Tio surprizas min, ĉar oni ĉiam opiniis, ke Petro estas kontraŭ la guberniestra partio!

S-INO HEYST.

Kredeble li do ŝanĝis opinion.

ELIS.

Ŝajne li ne senkaŭze nomiĝas Petro.

S-INO HEYST.

Kion vi havas kontraŭ la guberniestro?

ELIS.

Li estas malhelpanto! Li malhelpas ĉion; li malhelpis la popolan altlernejon, malhelpis la armilekzercojn de la junuloj, li volis malebligi la senkulpajn biciklojn, la belajn somerkoloniojn por lernantoj ... kaj li malhelpis min!

S-INO HEYST.

Tion mi ne komprenas ... kaj povas esti egale. Ĉiuokaze la guberniestro faris paroladon ... kaj Petro dankis ...

ELIS.

... kortuŝite, mi supozas, kaj perfidis sian instruiston dirante: »Mi ne konas tiun homon.« Kaj ree kriis la koko! Ĉu la guberniestro ne nomiĝis Pontius kun la postnomo Pilato?

ELEONORA

(movas sin, kvazaŭ ŝi volus paroli, sed trankviliĝas).

S-INO HEYST.

Ne estu tiel amara, Elis. Homoj estas homoj, kaj oni devas toleri ilin!

ELIS.

Silentu! Mi aŭdas, ke Lindkvist venas!

S-INO HEYST.

Ĉu vi povas aŭdi lin en la neĝo?

ELIS.

Mi aŭdas lian bastonon puŝi la ŝtonojn kaj liajn ledgaloŝojn! ... Eliru, panjo!

S-INO HEYST.

Ne, nun mi volas resti por diri ion al li!

ELIS.

Kara panjo, foriru! Estos tro turmente!

S-INO HEYST (leviĝas; ekscitita).

Estu forgesita la tago de mia naskiĝo!

KRISTINA.

Ne blasfemu!

S-INO HEYST

(kun esprimo de anima grandeco).

»Ĉu ne prefere maljustulo havu tiun ĉi malfacilaĵon kaj malbonfaranto suferu en tia mizero.«

ELEONORA

(kun angora ekkrio).

Patrino!

S-INO HEYST.

Dio, kial vi min forlasis! Kaj miajn infanojn!
(Eliras maldekstre.)

*

ELIS (aŭskultas alekstere).

Li haltis! ... Eble ŝajnas al li ne dece ... aŭ tro kruele! ... Sed certe ne ŝajnas al li tiel, al li, kiu povis skribi tiel terurajn leterojn! Ili ĉiam estis sur blua papero, kaj de tiam mi ne povas vidi bluan leteron sen tremi!

KRISTINA.

Kion vi intencas diri, kion vi intencas proponi?

ELIS.

Mi ne scias! Mi perdis ĉiun ekvilibron, ĉiun pripensemon ... Ĉu mi ekĝenuu antaŭ li, petu lin pri kompato ... Ĉu vi aŭdas lin? Mi aŭdas nur la sangon, kiu susuras en miaj oreloj.

KRISTINA.

Ni supozu la plej malbonan! Li prenos ĉion ...

ELIS.

Poste venos la dommastro kaj volas havi garantion, kiun mi ne povas havigi ... Li volas havi garantion, kiam la mebloj ne plu staras kiel garantio por la lupago!

KRISTINA.

(kiu malantaŭ la kurteno rigardis al la strato).

Li ne plu estas tie! Li foriris!

ELIS.

A! ... Ĉu vi scias, la indiferenta submetiĝo de patrino pli suferigas min ol ŝia kolero!

KRISTINA.

Ŝia submetiĝo estas nur ŝajnigita aŭ imagita. Es-

tis io de leonina bleko en ŝiaj lastaj vortoj ... Ĉu vi vidis, kiel granda ŝi fariĝis?

ELIS.

Strange, kiam mi nun pensas pri Lindkvist, mi vidas lin kiel bonhumora giganto, kiu volas nur timigi infanojn! Kiel tio povas veni al mi nun?

KRISTINA.

La pensoj venas kaj pasas ...

ELIS.

Kia feliĉo, ke mi ne partoprenis la tagmanĝon hieraŭ ... Certe mi estus farinta paroladon kontraŭ la guberniestro ... kaj tiel estus detruinta ĉion por mi kaj ni! Estis granda feliĉo!

KRISTINA.

Vidu!

ELIS.

Dankon pro la konsilo. Vi konis vian Petron!

KRISTINA.

Mian Petron!

ELIS.

Mi volis diri ... mian! Jen, nun li denove estas tie! Ve al ni!

(Oni vidas sur la kurteno la ombron de viro, kiu hezite proksimiĝas. La ombro iom post iom grandiĝas kaj fariĝas giganta. Ĉiujn kaptas plej granda angoro.)

La giganto! La giganto, kiu volas engluti nin!

KRISTINA.

Nun oni devas ridi kiel en la fabeloj!

ELIS.

Mi ne povas ridi plu!

(La ombro malpligrandiĝas kaj malaperas.)

KRISTINA.

Rigardu la bastonon, do, kaj vi devos ridi!

ELIS.

Li foriris! Nun mi povas spiri, ĉar nun li revenos nur morgaŭ! Ho!

KRISTINA.

Kaj morgaŭ brilos la suno, tiam estos la tago antaŭ la reviviĝo, la neĝo estos for, kaj la birdoj kantos.

ELIS.

Parolu pli multe pri tiaj aferoj! Mi vidas ĉion, kion vi diras.

KRISTINA.

Ke vi povu rigardi en mian koron, ke vi povu vidi miajn pensojn, miajn bonajn intencojn, mian plej koran peton, Elis, Elis, kiam mi nun ... (Silentiĝas.)

ELIS.

Kion? Diru?

KRISTINA.

Kiam mi nun ... petas vin pri io.

ELIS.

Diru!

KRISTINA.

Estas provo! Pensu pri tio, ke estas provo, Elis!

ELIS.

Provo! Provsufero? Bone!

KRISTINA.

Permesu ... Ne, mi ne kuraĝas! Povos malsukcesesi!

ELEONORA (ekaŭskultas).

ELIS.

Kial vi turmentas min?

KRISTINA.

Certe oni devos penti tion! ... Sed estu! Elis, permesu al mi iri al la koncerto hodiaŭ vespere.

ELIS.

Kiu koncerto?

KRISTINA.

»La sep vortoj sur la kruco» de Haydn, en la katedralo!

ELIS.

Kun kiu?

KRISTINA.

Kun Alice ...

ELIS.

Kaj?

KRISTINA.

Petro!

ELIS.

Kun Petro!

KRISTINA.

Jen vi malheliĝis! ... Mi pentas, sed estas tro malfrue!

ELIS.

Jes, estas iom tro malfrue! Sed klarigu!

KRISTINA.

Mi avertis vin, ke mi ne povos klarigi, sed tial mi petis pri via senlima konfido!

ELIS (milde).

Iru! Mi fidas al vi; sed tamen mi suferas pro tio, ke vi serĉas kuneston kun tiu perfidulo!

KRISTINA.

Tion mi komprenas! Sed estas ja provo!

ELIS.

Kiun mi ne povas trapasi!

KRISTINA.

Vi devas!

ELIS.

Mi volas, sed mi ne povas! — Tamen iru!

KRISTINA.

Vian manon!

ELIS (donas la manon).

Jen!

(La telefono sonoras.)

ELIS (al la telefono).

Hola! ... Neniu respondo! ... Hola! ... Respon-
das per mia propra voĉo! ... Kiu parolas? ... Kiel
strange! Mi aŭdas miajn proprajn vortojn kiel eĥon!

KRISTINA.

Tio ja foje okazas!

ELIS.

Hola! ... Nun estas timige! (Remetas la mikrofonon.)
Iru nun, Kristina! Sen klarigoj, senĝene. Mi trapasos
la provon!

KRISTINA.

Estos bone por ni, se vi tion faros!

ELIS.

Mi faros! ...

KRISTINA (tiras sin dekstren).

ELIS.

Kial vi iras tiun vojon?

KRISTINA.

Mi havas miajn vestojn tie! Do! Ĝis revido!
(Foriras.)

ELIS.

Ĝis revido, mia amiko! (Paŭzo.) Por ĉiam!
(Elkuras maldekstre.)

*

BIBLIOTEKO

de la

NOVA ESPERANTO KLUBO

St. Gallen,



ELEONORA.

Helpu nin Dio, kion mi faris? La polico serĉas la kulpulon, kaj se oni trovos min — kompatinda patrino, kaj Elis!

BENJAMIN (naive).

Eleonora, diru, ke mi faris tion!

ELEONORA.

Infano, ĉu vi povas porti kulpon de alia?

BENJAMIN.

Estas ja facile fari tion, kiam oni scias, ke oni estas senkulpa.

ELEONORA.

Oni neniam mensogu!

BENJAMIN.

Nu, lasu min telefoni al la floristo por diri, kiel estas!

ELEONORA.

Ne, mi maljuste agis, kaj mi estu punata per maltrankvilo. Mi vekis ilian timon pro enrompo, kaj mi estu timigata.

BENJAMIN.

Sed se venos la polico ...

ELEONORA.

Estus ja malfacile ... sed do devus esti tiel! — Ho, ke tiu ĉi tago finiĝu!

(Prenas la pendolhorloĝon sur la manĝotablo kaj turnas la montrilojn.)

... Bona horloĝo, iru pli rapide! Tik, tak, ping, ping, ping! Nun estas la oka! Ping, ping, ping ... nun estas la naŭa! La deka! La dekunua! La dekdua! ... Nun estas sankta sabato! Baldaŭ la suno leviĝos, kaj tiam ni skribos sur la paskovoj! Mi skribos tiel: »Jen postulis vin la malamiko por kribri vin kiel tritikon; sed mi preĝis por vi» ...

BENJAMIN.

Kial vi tiel turmentas vin, Eleonora?

ELEONORA.

Mi! Turmentas! Benjamin, pensu pri ĉiuj ekfloritaj floroj, bluanemonoj kaj galantoj, kiuj staris en la neĝo la tutan tagon kaj la tutan nokton kaj sentas froston en la mallumo! Kiom ili suferas! Certe la nokto estas plej malfacila, kiam estas mallume kaj ili timas la mallumon kaj ne povas forkuri ... kaj staras kaj atendas la tagiĝon. Ĉio, ĉio suferas, sed plej la floroj! Kaj la migrobirdoj, kiuj venis! Kie ili dormu ĉi-nokte?

BENJAMIN (naive).

Vi ja scias, ke ili sidas en kavaj arboj.

ELEONORA.

Ne ekzistas tiom da kavaj arboj, ke sufiĉas por ĉiuj! Mi vidis nur du kavajn arbojn en la parkoj, kaj tie loĝas ja la strigoj, kiuj mortigas la birdetojn ... Kompatinda Elis, kiu kredas, ke Kristina foriris de li; sed mi scias, ke ŝi revenos!

BENJAMIN.

Kial vi ne diris, se vi scias tion?

ELEONORA.

Ĉar Elis devas suferi; ĉiuj devas suferi en la Sankta vendredo por memorigi al si la suferojn de Kristo sur la kruco.

(Polica fajfilo sonas ekstere sur la strato.)

ELEONORA (eksaltas).

Kio estis?

BENJAMIN.

Ĉu vi ne scias?

ELEONORA.

Ne!

BENJAMIN.

Estis la polico!

ELEONORA.

Ho! ... Jes, tiel sonis, kiam ili venis por kapti patron ... kaj tiam mi malsaniĝis! Kaj nun ili venas por preni min!

BENJAMIN

(starigas sin kontraŭ la fonpordo antaŭ Eleonoran).
Ne, ili ne prenu vin! Mi vin defendos, Eleonora!

ELEONORA.

Estas bele, Benjamin, sed vi ne faru ...

BENJAMIN

(elrigardas tra la kurtenoj).

Estas du!

(Eleonora volas torŝovi Benjamin'on, sed li milde kontraŭstaras.)

Ne vi, Eleonora, tiam — mi ne volus vivi plu!

ELEONORA.

Iru sidiĝi sur tiun seĝon, infano! Iru sidiĝi!

BENJAMIN (nevolonte obeas).

ELEONORA.

(elrigardas malantaŭ la kurtenoj sen kaŝi sin).

Estis nur du knaboj! Ho, ni senfidaj; ĉu vi kredas, ke Dio estis tiel kruela, kvankam mi nenion malbonan faris, nur agis senpense ... Tion mi meritis! Kial mi malfidis!

BENJAMIN.

Sed morgaŭ venos li, kiu volas preni la meblojn.

ELEONORA.

Li venu! Kaj ni eliru! De ĉio ... de ĉiuj malnovaj mebloj, kiujn patro kolektis por ni, kaj kiujn mi vidis, de kiam mi estis infaneto! Jes, oni ne devas po-

sedi ion, kio ligas al la tero. Eksteren sur la ŝtonajn vojojn por iradi per vundaj piedoj, ĉar tiu vojo kondukas supren, kaj tial ĝi estas peniga ...

BENJAMIN.

Nun vi ree turmentas vin, Eleonora!

ELEONORA.

Lasu min! ... Sed ĉu vi scias, de kie estas plej malfacile disiĝi? Estas la pendolhorloĝo tie! Ĝi kunestis, kiam mi naskiĝis, kaj ĝi elmezuris miajn horojn kaj tagojn ...

(Ŝi levas la horloĝon de la tablo.)

... Aŭdu, ĝi batetas kiel koro ... tute kiel koro ... kaj ĝi haltis en la horo, kiam avo mortis, ĉar ĝi kunestis jam tiam! Adiaŭ, horloĝeto, vi baldaŭ denove haltu! ... Jen, ĝi kutimis fruiĝi, kiam ni havis malfeliĉon en la domo, kvazaŭ ĝi volus transsalti la malbonon, por ni, kompreneble! Sed kiam estis bonaj tempoj, tiam ĝi malfruiĝis, por ke ni povu ilin ĝui pli longe. Tio estis la bona horloĝo! Sed ni havis ankaŭ malican ... kaj pro tio ĝi nun devas pendi en la kuirejo! Ĝi ne toleris muzikon, sed kiam Elis ludis sur la piano, ĝi tuj komencis bati, tion ni ĉiuj rimarkis, ne nur mi; kaj tial ĝi devas sidi en la kuirejo, ĉar ĝi estis malafabla! Sed Lina ankaŭ ne ŝatas ĝin, ĉar ĝi ne silentas dum la noktoj, kaj ŝi ne povas kuiri ovojn laŭ ĝi ... ĉar tiam ili ĉiam fariĝas tro kuiritaj, diras Lina! Nun vi ridas!

BENJAMIN.

Jes, kion mi faru! ...

ELEONORA.

Vi estas bona knabo, Benjamin, sed vi estu serioza! Memoru la branĉeton, kiu sidas malantaŭ la spegulo!

BENJAMIN.

Sed vi parolas ja tiel amuze, ke mi devas rideti ... kaj kial oni ĉiam ploru!

ELEONORA.

Se ne plori en la valo de mizero, kie do plori?

BENJAMIN.

Hm!

ELEONORA.

Vi volis ridi la tutan tagon, sed tial vi ankaŭ ricevis punon! Kaj mi ŝatas vin, nur kiam vi estas serioza. Memoru tion!

BENJAMIN.

Ĉu vi kredas, ke ni trapasos tion ĉi, Eleonora?

ELEONORA.

Jes, la plimulto ordiĝos, kiam nur pasis la Sankta vendredo, sed ne ĉio! Hodiaŭ branĉeton, morgaŭ paskovon! Hodiaŭ neĝo, morgaŭ degelo! Hodiaŭ morto, morgaŭ reviviĝo!

BENJAMIN.

Kiel saĝa vi estas!

ELEONORA.

Jes; mi jam sentas, ke ekstere klariĝas por bona vetero, ke la neĝo degelas ... jam oni tie ĉi interne sentas la odoron de degelanta neĝo ... kaj morgaŭ la violoj elburgoniĝos ĉe la sudflanko! La nuboj levigis, tion mi sentas, kiam mi spiras ... ho, mi tiel bone scias, kiam la ĉielo ne estas kaŝita! ... Iru flankentiri la kurtenojn, Benjamin; mi volas, ke Dio vidu nin!

BENJAMIN

(leviĝas kaj obeas; lunlumo falas en la ĉambron).

ELEONORA.

Vidu la plenlunon! Tiun de la pasko! Kaj nun vi scias, ke la suno ankoraŭ ekzistas, kvankam la luno redonas la lumon!

TRIA AKTO.

Sankta Sabato.

Muziko antaŭ tiu akto:

HAYDN:

Sieben Worte N:o 5. Adagio.

La sama dekoracio sed la kurtenoj tiritaj flanken. La pejzaĝo ekstere kiel antaŭe sed en griza vetero. Fajro en la forno; la fonpordoj fermitaj.

ELEONORA sidas antaŭ la forno kaj tenas bukedon da bluanemonoj antaŭ si.

BENJAMIN (eniras de dekstre).

ELEONORA.

Kie vi estis tiom longe, Benjamin?

BENJAMIN.

Ne estis longe!

ELEONORA.

Mi sopiris pri vi!

BENJAMIN.

Kie do estis vi, Eleonora?

ELEONORA.

Mi estis sur la foirplaco kaj aĉetis bluanemonojn, kaj nun mi varmigos ilin, ĉar frostis al ili, la kompatinduloj.

BENJAMIN.

Kie estas la suno?

ELEONORA.

Malantaŭ la nebuloj; hodiaŭ ne estas nuboj, estas nur marnebuloj, ĉar ili odoras de salo ...

BENJAMIN.

Ĉu vi vidis, ke la birdoj ankoraŭ vivas ekstere?

ELEONORA.

Jes, kaj neniuj falas al la tero sen la volo de Dio. Sed sur la foirplaco, tie estis mortintaj birdoj ...

*

ELIS (eniras de dekstre).

Ĉu la gazeto venis?

ELEONORA.

Ne, Elis!

ELIS.

(transiras la scenejon; kiam li estas meze sur la scenejo, venas KRISTINA de maldekstre).

KRISTINA (sen rimarki Elis'on).

Ĉu la gazeto venis?

ELEONORA.

Ne, ĝi ne venis!

(KRISTINA transiras la scenejon dekstren, preter ELIS, kiu iras maldekstren, kaj ili ne rigardas unu la alian.)

ELEONORA.

Hu, kiel malvarme fariĝis! Venis malamo en la domon! Kiam ankoraŭ estis amo tie ĉi, oni povis ĉion toleri, sed nun, hu, kiel malvarme!

BENJAMIN.

Kial ili demandas pri la gazeto?

ELEONORA.

Ĉu vi ne komprenas tion? Tie staros pri ...

BENJAMIN.

Kio?

ELEONORA.

Pri ĉio! Pri la enrompo, la polico kaj ankoraŭ pli ...

*

S-INO HEYST (de dekstre).

Ĉu la gazeto venis?

ELEONORA.

Ne, panjo!

S-INO HEYST (ree eliras dekstre).

Diru unue al mi, kiam ĝi venos!

*

ELEONORA.

La gazeto, la gazeto! — — — Ho, se la presmaŝinoj estus rompiĝintaj, se la redaktoro estus malsaniĝinta ... ne, oni ne rajtas diri tiel! Aŭdu, lastnokte mi estis ĉe patro ...

BENJAMIN.

Lastnokte?

ELEONORA.

Jes, en la dormo ... kaj mi estis en Ameriko ĉe fratino ... antaŭhieraŭ ŝi vendis por tridek dolaroj, kaj tiam ŝi gajnis kvin.

BENJAMIN.

Ĉu tio estas multe aŭ malmulte?

ELEONORA.

Estas sufiĉe multe!

BENJAMIN (ruze).

Ĉu vi renkontis iun konaton sur la foirplaco?

ELEONORA.

Kial vi tion demandas? Ne estu ruza al mi, Benjamin; vi volas ekscii miajn sekretojn, sed mi ne donos ilin.

BENJAMIN.

Ĉu vi kredas, ke vi tiamaniere ekscios la miajn!

ELEONORA.

Aŭdu, la telefondratoj kantas. Do la gazeto nun aperis; kaj nun telefonas la homoj! »Ĉu vi legis?» »Jes mi legis!» »Ĉu ne estas terure?»

BENJAMIN.

Kio estas terura?

ELEONORA.

Ĉio! La tuta vivo estas terura! Sed ni tamen devas esti kontentaj! ... Pensu pri Elis kaj Kristina; ili ŝatas unu la alian, kaj tamen ili malamas unu la alian, tiel ke la termometro malaltiĝas, kiam ili iras tra la ĉambro! Ŝi estis en la koncerto hieraŭ, kaj hodiaŭ ili ne parolas unu al la alia ... kial, kial?

BENJAMIN.

Ĉar via frato estas ĵaluza!

ELEONORA.

Ne diru tiun vorton! Kiom vi cetere scias pri ĝi krom tio, ke ĝi estas malsano kaj sekve puno. Oni ne tuŝu la malbonon, alie ĝi nin atakas! Rigardu al Elis; ĉu vi rimarkis, kiom li ŝanĝiĝis, de kiam li komencis legi en tiuj paperoj ...

BENJAMIN.

De la proceso?

ELEONORA.

Jes! Ĉu ne estas, kvazaŭ la tuta malbono en ĝi estus penetrinta en lian animon kaj nun elbrilus tra lia vizaĝo kaj liaj rigardoj ... Tion sentas Kristina, kaj por ke ŝi ne infektiĝu de lia malbono, ŝi faras al si kirason el glacio! Ho, tiuj paperoj; se mi povus bruligi ilin! Ili elradias malicon kaj falsecon kaj venĝemon. Tial, mia infano, tenu for de vi la malbonon kaj la malpuraĵon, de viaj lipoj kaj de via koro!

BENJAMIN.

Kiel vi ĉion rimarkas?

ELEONORA.

Ĉu vi scias, kio atendos min, se Elis kaj la aliaj ekscios, ke estis mi, kiu aĉetis la pasklilion en tiu neordinara maniero?

BENJAMIN.

Kion ili povus fari al vi?

ELEONORA.

Oni resendos min ... tien, de kie mi venis, kie la suno ne lumas, kie la muroj estas blankaj kaj nudaj kiel en banĉambro, kie oni aŭdas nur ploradon kaj ĝemadon, kie mi forsidis unu jaron de mia vivo!

BENJAMIN.

Kion vi volas diri?

ELEONORA.

Kie oni estas pli turmentata ol en malliberejo, kie loĝas la kondamnitoj, la hejmo de maltrankvilo, kie malespero dormas nek nokte nek tage, kaj de kie ne niu revenas.

BENJAMIN.

Pli malfacila ol malliberejo, kion vi volas diri?

ELEONORA.

En la malliberejo oni estas verdiktita, sed tie oni estas kondamnita! En la malliberejo oni estas ekzamenita kaj aŭskultita, sed tie neniu esploris ... Kompatinda paskolilio, kiu kulpas; mi volis tiel bone kaj agis tiel malbone!

BENJAMIN.

Sed kial vi ne iras al la floristo kaj diras »tiel estis»? Vi estas precize kiel ŝafido, kiam ĝi devas morti.

ELEONORA.

Kiam ĝi scias, ke ĝi estas buĉota, ĝi ne plendas kaj ne provas forkuri. Kion ĝi povus fari!

*

ELIS

(envenas de maldekstre kun letero en la mano).

Ĉu la gazeto ankoraŭ ne venis?

ELEONORA.

Ne, mia frato!

ELIS

(turnas sin, parolas en la kuirejon).

Lina, iru por aĉeti gazeton! ...

S-INO HEYST (envenas de dekstre).

ELEONORA kaj BENJAMIN (terurigas).

ELIS

(al Eleonora kaj Benjamin).

Estu afablaj, infanoj, kaj eliru por momento!

(ELEONORA kaj BENJAMIN eliras maldekstre.)

*

S-INO HEYST.

Vi ricevis leteron?

ELIS.

Jes!

S-INO HEYST.

De la azilo?

ELIS.

Jes!

S-INO HEYST.

Kion oni volas?

ELIS.

Oni postulas, ke Eleonora revenu.

S-INO HEYST.

Oni ne rajtas! Estas mia infano!

ELIS.

Mia fratino!

S-INO HEYST.

Kion vi do pensas?

ELIS.

Mi ne scias! Mi ne povas pensi plu!

S-INO HEYST.

Sed tion povas mi! ... Eleonora, la infano de malĝojo, venis kun ĝojo, tamen ne de tiu ĉi mondo; ŝia maltrankvilo transformiĝis en pacon, kiun ŝi disdonas! Prudenta aŭ ne! Al mi ŝi estas saĝa, ĉar ŝi komprenas porti la ŝarĝon de la vivo pli bone ol mi, ol ni. Cetere, Elis, ĉu mi estas prudenta, ĉu estis, kiam mi kredis mian edzon senkulpa? Mi ja sciis, ke li estis pruvita kulpa per materiaj, evidentaj pruvoj, kaj ke li mem konfesis! ... Kaj vi, Elis, ĉu vi havas vian prudenton, kiam vi ne vidas, ke Kristina amas vin? Kiam vi kredas, ke ŝi malamas vin?

ELIS.

Estas stranga maniero ami!

S-INO HEYST.

Ne! Via malvarmo frostigas ŝin interne, kaj estas vi, kiu malamas. Sed vi estas malprava, kaj tial vi devas suferi!

ELIS.

Kiel mi povas esti malprava? Ĉu ŝi ne kunestis kun mia malfidela amiko hieraŭ vespere!

S-INO HEYST.

Jes, tion ŝi faris, kaj kun via scio. Sed kial ŝi iris? Jes, tion vi devus kompreni!

ELIS.

Ne, tion mi ne povas!

S-INO HEYST.

Nu! Estu do por vi, kiel estas!

*

(La kuireja pordo malfermiĝas, kaj mano transdonas gazeton, kiun s-ino Heyst akceptas kaj transdonas al Elis.)

ELIS.

Tio estis la sola vera malfeliĉo! Kune kun ŝi mi povis porti la aliajn! Sed nun fortiriĝis la lasta apogo, kaj mi falas!

S-INO HEYST.

Falu, sed falu ĝuste, kaj poste vi povos levi vin! ... Kio nova en la gazeto?

ELIS.

Mi ne scias; mi timas la gazeton hodiaŭ!

S-INO HEYST.

Donu al mi, kaj mi legos!

ELIS.

Ne! Atendu momenton! ...

S-INO HEYST.

Kion vi timas, kion vi atendas ...

ELIS.

La plej malbonan!

S-INO HEYST.

Tio jam tiom multfoje okazis ... Kaj vi, infano, se vi konus mian vivon ... se vi estus estinta kun mi, kiam mi vidis vian patron paŝon post paŝo iri en la pereon, sen povi averti la multajn, al kiuj li alportis malfeliĉon. Kiam li falis, mi sentis min kunkulpa, ĉar mi estis konscia pri la krimo, kaj se la juĝisto ne estus estinta saĝa viro, kiu komprenis mian malfacilan situacion kiel edzinon, ankaŭ mi estus punita!

ELIS.

Pro kio falis nia patro, mi neniam komprenis tion?

S-INO HEYST.

Pro fiero, kiel ni ĉiuj!

ELIS.

Kial ni senkulpaj suferu pro liaj eraroj?

S-INO HEYST.

Silentu! ...

(Paŭzo, dum kiu ŝi prenas la gazeton kaj legas.)

ELIS

(staras unue maltrankvila, poste iras tien kaj reen).

S-INO HEYST.

Kio estas tio? ... Ĉu mi ne diris, ke interalie estis flava tulipo, kiun oni ŝtelis en la florvendejo?

ELIS.

Jes, tion mi certe memoras!

S-INO HEYST.

Sed tie ĉi staras ... ke paska lilio!

ELIS (terurite).

Ĉu staras tiel?

S-INO HEYST
(falsidiĝas sur seĝon).

Estas Eleonora! Ho Dio! Mia Dio!

ELIS.

Do, ankoraŭ ne finiĝis!

S-INO HEYST.

Al malliberejo aŭ azilo!

ELIS.

Ne estas eble, ke ŝi tion faris! Ne eble!

S-INO HEYST.

Kaj nun la nomo de la familio denove estos traktata kaj malhonorata ...

ELIS.

Ĉu oni suspektas ŝin?

S-INO HEYST.

La suspekto havas certan direkton al ... estas sufiĉe klare kien.

ELIS.

Mi parolos kun ŝi!

S-INO HEYST (leviĝas).

Parolu afable! Ĉar mi ne povas plu! ... Ŝi estas perdita ... retrovita kaj perdita ... Parolu kun ŝi! (Eliras dekstre.)

ELIS.

Ho! (Iras al la maldekstra pordo.) Eleonora, mia infano! Venu, mi volas paroli kun vi!

ELEONORA
(envenas; la hararo disligita).

Mi volis aranĝi harkronon!

ELIS.

Lasu tion! ... Diru, fratineto, kie vi ricevis tiun floron?

ELEONORA.

Mi prenis ĝin ...

ELIS.

Ho Dio!

ELEONORA

(kun klinita kapo, frakasita, kun la brakoj kruce sur la brusto).

Sed mi metis la monon apude ...

ELIS.

Vi do pagis ĝin?

ELEONORA.

Jes, kaj ne! Ĉiam estas tiel malagrabla ... sed mi faris nenion malbonan ... mi nur bone volis ... Ĉu vi kredas min?

ELIS.

Mi kredas vin, fratino; sed la gazeto ne scias, ke vi estas senkulpa!

ELEONORA.

Kara, do mi devas suferi ankaŭ tion ...
(Ŝi klinas la kapon, tiel ke la hararo malsuprenpendas antaŭe.)

Kion oni nun volas fari al mi? Oni do faru tion!

BENJAMIN

(envenas de maldekstre, tre ekscitita).

Ne, ne tuŝu ŝin, ĉar ŝi nenion malbonan faris. Mi scias tion, ĉar estis mi, mi, mi — (Ploras) — kiu faris tion!

ELEONORA.

Ne kredu, kion li diras ... estis mi!

ELIS.

Kion mi kredu; kiun mi kredu?

BENJAMIN.

Min! min!

ELEONORA.

Min! min!

BENJAMIN.

Lasu min iri al la polico ...

ELIS.

Silentu, silentu ...

BENJAMIN.

Ne, mi volas iri, mi volas iri ...

ELIS.

Silentu, infanoj! Patrino venas!

*

S-INO HEYST

(envenas, tre ekscitita, ĉirkaŭbrakas Eleonoran kaj kisas ŝin).

Infano, infano, mia kara infano! Vi estas ĉe mi, kaj vi restos ĉe mi!

ELEONORA.

Vi kisas min, patrino? Tion vi ne faris dum multaj jaroj. Kial nur nun?

S-INO HEYST.

Ĉar ... ĉar la floristo estas tie kaj petas pardonon pro tio, ke li kaŭzis tiom da malagrablo ... la perdita monero estas retrovita kaj via nomo ...

ELEONORA

(kuras en la brakojn de Elis kaj kisas lin; poste ŝi ĉirkaŭprenas la kolon de Benjamin kaj kisas lin supre sur la kapo).

Vi bona infano, kiu volis suferi por mi! Kiel vi povis tion voli?

BENJAMIN (kaŝiĝeme, naive).

Ĉar mi tiom ŝatas vin, Eleonora!

S-INO HEYST.

Nun surmetu vestojn kaj iru en la ĝardenon, infanoj. La ĉielo klariĝas!

ELEONORA.

Ho, klariĝas! Venu, Benjamin!

(Prenas lian manon; manenmane ili eliras maldekstre.)

*

ELIS.

Ĉu ni baldaŭ povos ĵeti la branĉeton sur la fajron?

S-INO HEYST.

Ankoraŭ ne! Iom restas!

ELIS.

Ĉu Lindkvist?

S-INO HEYST.

Li atendas tie! Sed li estas tre stranga kaj nekompreneble milda; domaĝe nur, ke li estas tiel multvorta kaj tiom parolas pri si mem.

ELIS.

Nun, kiam mi vidis sunradion, mi ne timas renkonti la giganton. Li venu!

S-INO HEYST.

Sed ne incitu lin ... La providenco metis nian sorton en liajn manojn, kaj la pacemuloj ... nu, vi scias, kien iras la fieruloj!

ELIS.

Mi scias! ... Aŭdu! Tiujn galoŝojn: lupoj, lup', lup', vitŝ! Ĉu li intencas eniri kun ili. Kial ne? Estas liaj tapiŝoj kaj mebloj ...

S-INO HEYST

Elis! Pensu pri ni ĉiuj! (Eliras dekstre.)

ELIS.

Tion mi faras, patrino!

LINDKVIST

(eniras de dekstre. Estas iom maljuna, serioza viro kun terura aspekto. Li havas *grizajn* harojn kun surfrunta hartufo kaj "huzartempioj". Grandaj *nigraj* tufaj brovoj. Malgrandaj mal-longtranĉitaj *nigraj* vangharoj. Okulvitroj kun nigra kadraĵo, rondaj. Grandaj karneolbrelokoj sur la horloĝa ĉeno; kanbastono en la mano. Nigre vestita kun pelt; cilindra ĉapelo en la mano; altaj botoj kun galoŝoj, kiuj knaras. Enirante li scivoleme rigardas Elis'on kaj dum la tuta tempo restas staranta).

Lindkvist estas mia nomo!

ELIS (defendeme).

Kandidato Heyst la mia! ... Bonvolu sidiĝi.

LINDKVIST

(sidiĝas sur la seĝon dekstre de la kudrotablo kaj fikse rigardas Elis'on).

(Paŭzo.)

ELIS.

Per kio mi povas servi?

LINDKVIST (solene).

Hm! — Mi havis la honoron jam hieraŭ vespere anonci mian intencitan viziton; sed je plua pripenso mi trovis nedece komenci interparolon pri monaferoj en festotago.

ELIS.

Ni estas tre dankaj ...

LINDKVIST (akre).

Ni ne estas dankaj! Jes! (Paŭzo.) Nu; antaŭhieran mi okaze vizitis la guberniestron ...

(Paŭzas por vidi, kian impreson la vorto faras al Elis.)

... ĉu vi konas la guberniestron?

ELIS (senrespekte).

Mi ne havas la honoron!

LINDKVIST.

Do vi havos tiun honoron! ... Tie ni parolis pri via patro!

ELIS.

Tion mi kredas!

LINDKVIST.

(prenas paperon el la poŝo kaj metas ĝin sur la tablon).

Kaj tie mi ricevis tiun ĉi paperon!

ELIS.

Ĝin mi longe atendis! Sed antaŭ ol ni daŭrigos, mi petas permeson demandi pri io!

LINDKVIST (abrupte).

Bonvolu!

ELIS.

Kial vi ne transdonas tiun paperon al la oficistoj, tiel ni almenaŭ evitus tiun ĉi turmentan kaj malrapidan ekzekuton?

LINDKVIST.

Aha, juna viro!

ELIS.

Juna aŭ ne, mi ne petas kompaton, nur justecon!

LINDKVIST.

Tiel! Ne kompaton, ne kompaton! ... Rigardu la paperon, kiun mi metis sur la tablorandon! Jen mi re-enmetas ĝin! ... Do justecon! Nur justecon! Aŭskultu, amiko; iam oni rabis de mi, en malagrable maniero, rabis de mi mian monon! Kiam mi tiam ĝentile skribis al vi kaj demandis, kiom da prokrasto vi bezonas, vi respondis malĝentile! Kaj traktis min, kvazaŭ mi estus procentegisto, kiu volas prirabi vidvinojn kaj senpatrulojn, kvankam ja mi estis la prirabito kaj vi apartenis al la rabanta parto. Sed, ĉar mi estis pli prudenta, mi respondis vian malĝentilan alparolon per ĝentila, sed akra! Vi konas mian bluan paperon; ĉu? Mi povas meti stampojn sur ĝin, kiam mi volas, sed foje mi ne volas!

(Ĉirkaŭrigardas en la ĉambro.)

ELIS.

Bonvolu, la mebloj estas al via dispono!

LINDKVIST.

Mi ne rigardis la meblojn! Mi rigardis, ĉu via patrino estas tie ĉi? Verŝajne ŝi amas la justecon same forte kiel vi!

ELIS.

Mi esperas tion!

LINDKVIST.

Bone! ... Ĉu vi scias, ke via patrino estus submetita al la homa justeco, ĉar ŝi estis konscia pri la krima ago, se ĉio estus farita laŭ la justeco, kiun vi tiel alte taksas?

ELIS.

Sed ne!

LINDKVIST.

Jes, kaj ankoraŭ ne estas tro malfrue!

ELIS (leviĝas).

Mia patrino!

LINDKVIST

(elprenas alian sed bluan paperon kaj metas ĝin sur la tablon).

Vidu, nun mi metas tiun ĉi paperon sur la tablon, kaj ĝi efektive estas blua ... tamen ankoraŭ mankas stampoj!

ELIS.

Dio en ĉielo! Mia patrino! Ĉio revenas.

LINDKVIST.

Jes, mia juna amanto de la justeco, ĉio revenas, ĉio! ... Tiel estas! ... Se mi nun farus tiun demandon al mi: Vi, Anders Johan Lindkvist, naskita en malriĉo kaj kreskinta en manko kaj laboro, ĉu vi rajtas en via maljunaĝo forpreni de vi kaj viaj infanoj, rimarku: viaj infanoj, tiun monon, kiun vi per diligento, pripenso kaj rezignoj, rimarku: rezignoj, kolektis oeron post oero? Kion vi farus, Anders Johan Lindkvist, se vi volus esti justa? Vi prirabis nenium, sed se ŝajnas al vi malagrabla, ke oni prirabis vin, vi ne povos plu loĝi en urboj, ĉar neniu volas saluti la senkompatulon, kiu repostulis la sian. Ĉu vi do vidas, ke ekzistas kompato, kiu estas kontraŭ la justeco kaj super ĝi! ... Tio estas la graco!

ELIS.

Vi pravas, prenu ĉion! Ĝi apartenas al vi!

LINDKVIST.

Mi rajtas, sed mi ne kuraĝas!

ELIS.

Mi pensos pri viaj infanoj kaj ne plendos!

LINDKVIST (enpoŝigas la paperon).

Bone! Do ni re-enmetos la bluan paperon! ... Nun ni faru pluan paŝon!

ELIS.

Pardonu ... ĉu oni vere intencas akuzi mian patrinon?

LINDKVIST.

Nun ni faru pluan paŝon, unue! Vi do ne konas la guberniestron persone?

ELIS.

Ne, kaj mi ne volas koni lin!

LINDKVIST

(elprenas la bluan paperon kaj gestas per ĝi).

Ne tiel, ne tiel! ... Vidu, la guberniestro estis junaĝa amiko de via patro, kaj li deziras konatiĝi kun vi. Ĉio revenas, ĉio! Ĉu vi ne volas viziti lin?

ELIS.

Ne!

LINDKVIST.

La guberniestro ...

ELIS.

Ni prenu alian temon?

LINDKVIST.

Estu ĝentila al mi, ĉar mi estas sendefenda ... nome vin subtenas la publika opinio sed min nur la justeco. Kion vi havas kontraŭ la guberniestro? Li ne ŝatas biciklojn kaj popolajn altlernejojn, tio apartenas al liaj malgrandaj apartaĵoj. Ni ne bezonas precize respekti la apartaĵojn, sed ni preteriru ilin, preteriru kaj tenu nin al la ĉefaferoj, inter homo kaj homo! En la grandaj krizoj de la vivo ni devas akcepti unu la alian kun mankoj kaj malfortecoj, engluti kun haŭto kaj haroj! ... Iru al la guberniestro!

ELIS.

Neniam!

LINDKVIST.

Ĉu vi estas tia homo!

ELIS (decide).

Jes, tia!

LINDKVIST

(leviĝas kaj komencas iri tien kaj reen sur la planko kun siaj knarantaj botoj, gestante per la blua papero).

Malfacila afero! Malfacila! ... Nu, do mi komencu de alia flanko! ... Vengema persono intencas akuzi vian patrinon. Tion vi povas malebligi!

ELIS.

Kiel?

LINDKVIST.

Iru al la guberniestro!

ELIS.

Ne!

LINDKVIST

(aliras kaj kaptas la ŝultrojn de Elis).

Do vi estas la plej aĉa homo, kiun mi en mia vivo renkontis! Kaj nun mi mem iros al via patrino!

ELIS.

Ne iru!

LINDKVIST.

Ĉu vi do volas iri al la guberniestro?

ELIS.

Jes!

LINDKVIST.

Diru ankoraŭfoje, kaj pli laŭte!

ELIS.

Jes!

LINDKVIST.

Do ti u afero estas klara! (Transdonas la bluan paperon.) Tie estas ti u papero!

ELIS

(prenas la paperon sen legi).

LINDKVIST.

Poste ni havas numeron du; kiu estis numero unu! ... Ĉu ni sidiĝu! ... (Ili sidiĝas kiel antaŭe.) Vidu, se ni nur iras renkonte unu al la alia, la vojo mal-longiĝas per duono! ... Numero du! ... Estas tiu ĉi bonhavpostulo pri viaj hejmaĵoj! ... Jes, neniujn iluziojn, ĉar mi nek povas nek volas fordonaci la komunan posedaĵon de mia familio! Mi devas havi mian bonhavan ĝis la lasta oero.

ELIS.

Tion mi komprenas!

LINDKVIST.

Aha, tion vi komprenas?

ELIS.

Mi ne intencis ion ofendan ...

LINDKVIST.

Ne, mi komprenas tion.

(levas la okulvitrojn kaj fiksrigardas Ellis'on.)

... La lupo! Gluanta lupo! Vergoj, vergoj! Kaj la karnoruĝa karneolo; la giganto el la montoj, kiuj ne manĝas infanojn, nur timigas ilin! Mi timigos vin, jes, tiel ke vi frenezigos. La valoron de ĉiu meblopeco mi elpremos ... mi havas la liston tie ĉi en la poŝo, kaj se mankos iu sola peco, tiam vi iros en lokon, kie lumos nek la suno nek Cassiopeja! Jes, mi povas manĝi infanojn kaj vidvinojn, kiam oni incitas min, kaj la publika opinio? pah ĝi ... mi nur transloĝigos al alia urbo!

ELIS (ne povas respondi).

LINDKVIST.

Vi havis amikon, kiu nomiĝis Petro, Petro Holmblad. Li estis lingvisto kaj via lernanto en lingvoj. Sed vi volis fari ian profeton el li ... Nu, li estis malfidela; du fojojn kriis la koko, ĉu ne?

ELIS (silentas).

LINDKVIST.

La homa naturo estas nefidinda kiel la aĵoj kaj la pensoj; Petro estis malfidela, tion mi ne neas, kaj ne defendas lin. En tiu punkto! Sed la homa koro estas senfunda, kaj tie kuŝas oro kaj skorio intermikse! Petro estis por vi malfidela amiko, sed tamen amiko!

ELIS.

Malfidela ...

LINDKVIST.

Malfidela, jes, sed tamen amiko! Tiu malfidela amiko sen via scio faris al vi grandan amikan servon.

ELIS.

Ankaŭ tio!

LINDKVIST.

(tiras sin pli proksimen al Elis).

Ĉio revenas, ĉio!

ELIS.

Ĉio malbona, jes! Kaj rekompenco por bono estas malbono!

LINDKVIST.

Ne ĉiam; ankaŭ la bono revenas! KREDU MIN!

ELIS.

Verŝajne mi devas, alie vi elturmentus mian vivon el mi!

LINDKVIST.

Ne la vivon, sed la fieron kaj la malicon mi elpremos el vi!

ELIS.

Daŭrigu!

LINDKVIST.

Petro faris al vi servon, mi diris!

ELIS.

Mi ne volas akcepti servojn de tiu homo!

LINDKVIST.

Ĉu ni nun denove estas tie! ... Aŭskultu! Perperado de via amiko Petro la guberniestro estas persvadita pledi por via patrino! Tial vi devas skribi leteron al Petro por danki lin! Promesu tion!

ELIS.

Ne! Kiun ajn homon en la mondo sed lin ne!

LINDKVIST

(tiras sin pli proksimen).

Mi do ree premu vin ... Jen, vi havas monon en la banko!

ELIS.

Nu, kiom tio koncernas vin! Mi tamen ne respondecas pri la ŝuldoj de mia patro!

LINDKVIST.

Tiel! Tiel! Ĉu vi ne kunestis kaj manĝis kaj trinkis, kiam oni en tiu ĉi domo elspezis la monon de miaj infanoj? Respondu!

ELIS.

Tion mi ne povas nei.

LINDKVIST.

Kaj ĉar la mebloj ne sufiĉas por pagi la ŝuldon, vi tuj skribu ĉekon pri la resto — la sumon vi scias.

ELIS (frakasita).

Ankaŭ tio!

LINDKVIST.

Ankaŭ tio! Bonvolu skribi!

ELIS

(leviĝas, elprenas la ĉeklibron kaj skribas ĉe la skribotablo).

LINDKVIST.

Skribu ĝin por vi aŭ ĝirato!

ELIS.

Tamen ne sufiĉos!

LINDKVIST.

Do vi devas iri por prunti la reston! Ĉiun oeron mi devas havi!

ELIS.

(transdonas la ĉekon al Lindkvist).

Jen ĉio, kion mi posedas! Estas mia somero kaj mia fianĉino; pli mi ne havas por doni!

LINDKVIST.

Mi ja diris, ke do vi devas prunti!

ELIS.

Ne estas eble!

LINDKVIST.

Do serĉu garantianton!

ELIS.

Neniu volas garantii por iu Heyst!

LINDKVIST.

Kiel ultimaton mi donos al vi du alternativojn:
Danku Petron, aŭ pagu la tutan sumon!

ELIS.

Mi ne volas interrilati kun Petro.

LINDKVIST.

Vi estas la plej aĉa homo, kiun mi konas! Per
simpla ago de ĝentileco vi povas savi la hejmon de
via patrino kaj la vivrimedojn por via fianĉino, sed
vi ne faras tion! Devas ekzisti motivoj, kiujn vi ne
volas diri! Kial vi malamas Petron?

ELIS.

Mortigu min, sed ne turmentu min plu!

LINDKVIST.

Vi estas ĵaluza kontraŭ li!

ELIS (skuas la ŝultrojn).

LINDKVIST.

Estas tiel! ...

(Leviĝas kaj iras sur la planko. Paŭzo.)

Ĉu vi legis la matenan gazeton?

ELIS.

Jes, bedaŭrinde!

LINDKVIST.

La tutan gazeton?

ELIS.

Ne, ne la tutan!

LINDKVIST.

Aha! ... Tiel? Do vi ne scias, ke Petro fianĉiĝis?

ELIS.

Tion mi ne sciis!

LINDKVIST.

Kaj ne al kiu? Divenu!

ELIS.

Kiel ...

LINDKVIST.

Li fianĉiĝis al fraŭlino Alice, kaj la afero pretiĝis
hieraŭ vespere en koncerto, kie via fianĉino aperis
kiel peranto!

ELIS.

Kial tiel sekrete?

LINDKVIST.

Ĉu du junaj homoj ne rajtas havi siajn korsekre-
tojn malgraŭ vi?

ELIS.

Kaj por ilia feliĉo mi devis suferi tiujn turmentojn?

LINDKVIST.

Jes! Ili, kiuj suferis por doni feliĉon al vi! ... Via
patrino, via patro, via fianĉino, via fratino ... Sid-
iĝu, kaj mi rakontos al vi historion, tre mallonge!

ELIS (sidiĝas nevolonte).

(Dum la antaŭa kaj sekvonta scenoj klariĝas ekstere.)

LINDKVIST.

Estis antaŭ kvardek jaroj proksimume! Mi venis
kiel junulo al la ĉefurbo, sola, nekonata kaj sen kon-
atoj, por serĉi laboron. Mi posedis nur unu taleron,
kaj estis malluma vespero. Ĉar mi ne konis malka-
ran hotelon, mi demandis preterpasantojn; sed neniuj
respondis. Kiam mia malespero kulminis, venis viro
kaj demandis, kial mi ploras — nome mi ploris. Mi
rakontis al li pri mia mizero! Tiam li reiris sian vo-
jon, akompanis min al hotelo kaj konsolis min per

afablaj vortoj. Kiam mi trairis la vestiblon, oni malfermis butikan vitropordon, kiu puŝis mian kubuton, kaj la vitro rompiĝis. La furioza butikisto kaptis min kaj postulis pagon, aŭ li vokos la policon. Imagu mian malesperon, kaj antaŭ mi nokto sur la strato! — La bonvola nekonato, kiu vidis la tumulton, intervenas, faras al si la penon voki la policon kaj savas min! ... Tiu viro — estis via patro! ... Tiel ĉio revenas, ankaŭ la bono. Kaj pro via patro ... mi forstrekis mian bonhavan! ... Tial ... akceptu tiun ĉi paperon, kaj konservu ĉi tiun ĉekon! (Leviĝas.) Ĉar vi nur malfacile diras dankon, mi tuj foriros, precipe ĉar danko ĝenas min! (Proksimiĝas al la fonpordo.) Anstataŭe tuj iru al via patrino kaj liberigu ŝin de maltrankvilo! (Forigan geston al Elis, kiu volas proksimiĝi al li.)

Iru!

ELIS (elrapidas dekstre).

(La fonpordoj malfermiĝas. Eleonora kaj Benjamin envenas, trankvilaj sed seriozaj; haltas teruritaj, kiam ili ekvidas Lindkvist'on.)

LINDKVIST.

Nu, etuloj, eniru kaj ne timu ... Ĉu vi scias, kiu estas mi? ... (Per ŝanĝita voĉo.) Mi estas la giganto el la montoj, kiu timigas infanojn! Muh! Muh! ... Sed mi ne estas danĝera! — Venu, Eleonora! (Prenas ŝian kapon inter siaj manoj kaj rigardas en ŝiajn okulojn.)

Vi havas la bonajn okulojn de via patro, kaj li estis bona homo — sed malforta! (Kisas ŝian frunton.) Tiel!

ELEONORA.

Ho, li parolas bone pri patro! Ĉu iu povas pensi bone pri li?

LINDKVIST.

Tion povas mi! Demandu fraton Elis!

ELEONORA.

Do vi ne povas voli malbonon al ni!

LINDKVIST.

Ne, mia kara infano!

ELEONORA.

Nu, sed helpu nin do!

LINDKVIST.

Infano, mi ne povas liberigi vian patron de la puno, nek Benjamin'on de la latinskribo ... sed la alia jam estas helpita. La vivo ne donas ĉion, kaj nenion senpage. Tial vi helpu min, ĉu vi volas tion?

ELEONORA.

Kion povas fari mi, kompatinda?

LINDKVIST.

Kiu dato estas hodiaŭ? Rigardu!

ELEONORA

(prenas la datmontrilon de la muro).

Estas la deksesita!

LINDKVIST.

Bone! Antaŭ la dudeka vi devas igi fraton Elis fari viziton al la guberniestro kaj skribi leteron al Petro.

ELEONORA.

Nur tion!

LINDKVIST.

Ho, infano! Sed se li preterlasos tion, tiam venos la giganto kaj diros Muh!

ELEONORA.

Kial la giganto venas por timigi la infanojn?

LINDKVIST.

Por ke la infanoj fariĝu bonaj!

ELEONORA.

Estas vere! La giganto pravas!

(Kisas la peltmanikon de Lindkvist.)

Dankon, kara giganto!

BENJAMIN.

Sed vi devas diri »sinjoro Lindkvist»!

ELEONORA.

Ne, tiu nomo estas tiel ordinara ...

LINDKVIST.

Ĝis revido, infanoj! Nun vi povas ĵeti la branĉeton sur la fajron!

ELEONORA.

Ne, ĝi restu tie, ĉar la infanoj estas tiel forges-
emaj.

LINDKVIST.

Kiel bone vi konas la infanojn, etulino! (Foriras.)

ELEONORA.

Ni povos iri en la kamparon, Benjamin! Post du monatoj! Ho, se ili volus iri rapide!

(Ŝiras slipojn de la datmontrilo kaj ŝutas ilin en la sunstrion,
kiu falas en la ĉambron.)

Vidu, kiel pasas la tagoj! Aprilo! Majo! Junio! Kaj la suno lumas sur ĉiujn! Vidu! ... Nun danku Dion, kiu ebligis al ni iri al la kamparo!

BENJAMIN (kaŝiĝeme).

Ĉu mi ne povas diri tion silente?

ELEONORA.

Jes, vi povas diri ĝin silente! Ĉar nun la nuboj estas for, kaj tiam ĝi estas aŭdebla en la alto!


*

(KRISTINA envenis de maldekstre kaj haltis. ELIS kaj S-INO HEYST de dekstre. Kristina kaj Elis iras kun afablaj mienoj unu al la alia, sed la kurteno falas, antaŭ ol ili renkontiĝas.)



Prezo kr. 1:50.

Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000678982

Sture-Tryckeriet, Stockholm 1935.